

EL POPOLA ĈINIO

中國報道

3

1974



深山取
一九五二年
三月



Subteraj trezoroj estas en nia dispono

(Ĉinstila pentraĵo)



estas aktiva forto en agrikultura produktado.

La Komunumaninoj de Malu-brigado

La komunumaninoj de Malu-brigado de la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono aktive partoprenas en la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento kaj faris sur siaj postenoj kontribuon al la kampara socialisma konstruado. Nun 90 komunumaninoj funkcias kiel gvidantoj de la produktaj grupoj. Kamaradino Liaŭ Langi, komitatanino de la partia filio de la brigado, estas ankaŭ membro de la partiaj komitatoj de la komunumo kaj subregiono. Komunumaninoj partoprenas en 28 sciencoesploraj grupoj kaj ankaŭ en postlabora arta propaganda grupo de la brigado. Ili mem verkas kaj prezentas malgrandajn programerojn, kiuj spegulas bonajn homojn kaj aferojn kaj estas varme akceptataj de la komunumanoj.

Liaŭ Lanĝi (la dua de maldekstre) vizitas komunumanojn por aŭskulti iliajn opiniojn pri la laboro de la brigado.



Matĉo de korbopilko





Komunumaninoj en tri-
tika kampo



Junulinoj de scienca
grupo konsultas malju-
nan komunumanon pri
kulturo de kolzo.



Instruistino de la brigado Ĉen Hujfen varme akompanas lernantojn hejmen.

La amatora propaganda grupo antaŭ prezentado



Riĉa Rikolto de Agrikulturo de Nia Lando

EN 1973 nia agrikulturo akiris ampleksan riĉan rikolton. La totalaj produktokvantoj de greno, kotono, sukeraĵoj, kanabo, tabako k.a. atingis novan nivelon.

La produktokvanto de greno de 23 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj superis tiun de 1972, kaj tiu de 16 el ili superis la plej altan nivelon en la historio. En 1973 ankoraŭ plialtiĝis grandskale la grena produktokvanto de Pekino, Ŝanhajo, Ĝeĝiang, Ĝiangsu kaj Ĝuangdong, kies produktokvanto de greno multjare superis la normon difinitan de la Programo de Agrikultura Disvolviĝo de la Tuta Lando. La totala produktokvanto de greno de Pekino plimultiĝis tri dekonojn kompare kun tiu de 1972; la pohektara produktokvanto de greno de Ĝeĝiang refoje superis 7,500 kg. La 10 gubernioj en la antaŭurbo de Ŝanhajo ĝenerale akiris grandskalan pli-produkton de greno, la pohektara pro-

duktokvanto de greno de iliaj pli ol 500 produktaj grupoj superis 15,000 kilogramojn. Sur la bazo de grena memprovizo la provincoj Hebej, Ŝandong, Henan kaj la nordaj partoj de la provincoj Ĝiangsu kaj Anhuj, kiuj antaŭe ĉiam sentis malsufiĉon de greno, plirapidigis la disvolviĝon de grena produkto kaj akiris en 1973 la plej bonan rikolton en la historio. Tiuj longtempe grenmankaj regionoj nun havas superfluan grenon krom memprovizo, kio estas granda afero kun politika kaj ekonomia signifo por nia agrikulturo.

Ankaŭ la grena produktokvanto de la landlimaj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj Hejlongĝiang, Ĝilin, Interna Mongolio, Ĥinĝiang, Ĝuangĥi, Ĵunnan kaj Tibeto en 1973 multe superis tiun de 1972.

En 1973 la produktokvanto de niaj diversaj ĉefaj ekonomiaj plantaĵoj havis pli grandan kreskon. La pohektara kaj totala




Ĝojo pro riĉa rikolto

produktokvantoj de kotono de nia lando en 1973 estis la plej altaj en la historio, kaj ĝia totala produktokvanto estis du dekonojn pli multa ol tiu de 1972. Ankaŭ la totala produktokvanto de sukeraj plantaĵoj, kanabo kaj tabako superis la plej altan nivelon en la historio, inter ili la totala produktokvanto de kanabo k.a. fibrodonaj plantaĵoj kreskis pli ol kvar dekonojn kompare kun tiu de 1972 kaj estis la plej alta en la historio. Ankaŭ la oledonaj plantaĵoj akiris riĉan rikolton. La nombroj de bredataj tirbestoj kaj porkoj superis tiujn de la pasintaj jaroj kaj la fiŝado akiris grandan disvolviĝon.

La ŝtataj planoj por aĉeti grenon, kotonon, sukerajn plantaĵojn, kanabon k.a. jam estis superplenumitaj multe pli rapide ol en la pasintaj jaroj.

Riĉa rikolto de pomoj de Jantaj de Ŝandong-provinco





Kotonaĉeta stacio de Giangŝongŝou de Dangtu-gubernio de Anhuĵ-provinco

La riĉaj rikoltoj de nia agrikulturo en 1973 estis akiritaj dank' al la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, al la antaŭenpuŝado de la movado por kritiki Lin Biaŭ kaj reĝustigi laborstilon, al la amasa movado lerni de Daĝaj profunde disvolvita en la vasta kamparo kaj al la grandskalaj konstruoj kampaj kaj porakvaj, kaj al pli energia helpo de niaj industrioj.

En 1973, prenante Daĝaj-brigadon, la avangardan unuon sur nia agrikultura fronto, kiel ekzemplon kaj sin apogante sur la forto de kolektiva ekonomio, niaj diversaj lokoj disvolvis grandskalan konstruon kampaj kaj porakvaj kaj kreis stabile multedonajn kampojn. Laŭ statistiko de koncernaj institucioj, de post vintro de 1972,

nia lando ebenigis pli ol 3,300,000 hektarojn da agro, profunde plugis 12,700,000 hektarojn da kampoj, konstruis 670,000 hektarojn da ŝtuparaj kampoj kaj reformis saman kvanton da malmultedonaj kampoj en multedonajn. En 1973, la nordaj 14 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj fosis 300,000 maŝinputojn, kiuj kapablas irigacii 1,400,000 hektarojn da kampoj. La disvolviĝo de maŝinputoj tiujare estis plej rapida kaj la efiko plej granda de post la Liberiĝo. Tiuj fundamentaj kampaj kaj porakvaj konstruaĵoj ludis tre grandan rolon en la batalo kontraŭ naturaj katastrofoj kaj gajno de riĉaj rikoltoj de agrikulturo.

En 1973 la sciencaj eksperimentaj aktivadoj de agrikulturo en la tuta lando akiris



Riĉa rikolto de betoj en Hejlonggiang-provinco

viglan disvolvon. Multe kreskis la areo de bonaj specioj de rizo kaj tritiko kaj tiu de specioj de hibridigita maizo kreskis je kvaroblo kompare kun tiu antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio. Niaj diversaj lokoj akiris rimarkindajn sukcesojn ankaŭ en fosado de la teraj latentaj fortoj, reformado de kultura sistemo kaj multigo de kampoj plurfoje semitaj en unu jaro.

Nova tajdo de energia entreprenado de agrikulturo fare de la tuta Partio kaj la tuta popolo estis formita en la jaro 1973. Observante la ĝeneralan principon “preni agrikulturon kiel bazon kaj industrian kiel gvidan faktoron” por disvolvi la nacian ekonomion kaj ĝuste traktante la rilatojn inter agrikulturo, malpeza kaj peza industrioj, la diversaj regionoj kaj fakoj de la tuta lando metis agrikulturon sur la unuan lokon. La partiaj komitatoj de diversaj niveloj pluapase fortigis la gvi-

don al agrikulturo. Multaj provincoj, sub-provincoj kaj gubernioj sendis grandan nombron da kadroj en la agrikulturan fronton, por ke ili gvidu la produktadon kaj laboru kune kun la komunumanoj. En 1973 la investoj, poragrikulturaj materialoj kaj ekipaĵoj donitaj de la ŝtato al la agrikulturo rimarkinde kreskis kompare kun tiuj de la pasintaj jaroj. La poragrikulturaj produktaĵoj provizitaj de la industriaj branĉoj kreskis grandskale kompare kun tiuj de 1972. Kemia sterko kreskis je 20%, agrikulturaj medikamentoj je 11.9%, traktoroj kaj mantraktoroj respektive je 17% kaj 22%. Ankaŭ la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj urbanoj aktive kontribuis siajn fortojn por disvolvi agrikulturon. Okaze de serioza katastrofo aŭ manko de laborfortoj en la kamparo, ili organizite iris al kamparo por helpi la komunumanojn en rikolto, semado kaj batalo kontraŭ naturaj katastrofoj.

Vigle Disvolviĝanta Petrola Industrio de Ĉinio


SUB la direkto de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, persistante en la politiko de memstareco, sendependeco kaj sinapogo sur la propraj fortoj, nia lando akiris multajn sukcesojn sur la fronto de la petrola industrio.


En la jaro 1973, la tasko de petrola produkto laŭ la plano de nia ŝtato estis

superplenumita, plimultiĝis la produkto-kvantoj de nafto, benzino, keroseno, mazuto, lubrikaĵoj k.a., kaj ilia kvalito atingis la normon difinitan de la ŝtato.

Ĉinio estas lando kun riĉa petrolfonto. Post prospektorado de pli ol dek jaroj en nemalmultaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la lando oni trovis

Angulo de la Daking-a Ĝenerala Petrol-kemia Fabriko





La 3252-a putobora trupo de Sengli-petrolkampo en rapida borado

petrolkampojn kaj gaskampojn kun abunda konservo. Ankaŭ la kontinenta breto de nia lando prezentas brilan perspektivon. La petrola industrio de nia lando eniris en novan periodon en la jaro 1960 kiam Daking-a petrolkampo estis ekspluatita kaj konstruita, kaj de tiam la produktokvanto de nafto kreskis stabile kaj rapide. La Granda Proleta Kultura Revolucio komencita de 1966 antaŭenpuŝis la disvolviĝon de la petrola industrio de nia lando. En 1973, disvolvante la revolucian tradicion de Daking-petrolkampo, la vastaj amasoj de laboristoj kaj oficistoj sur petrola fronto faris ekspluaton kaj konstruadon de novaj petrolkampoj en pluraj lokoj de la tuta lando garantiante stabilan altan produktadon de malnovaj petrolkampoj, tiel ke rimarkinde altiĝis la produktivo de petrola industrio de nia lando.


Daking-petrolkampo grandpaŝe antaŭen marŝas. En 1973, la vastaj amasoj de

laboristoj kaj oficistoj unuflanke ordigis kaj reformis la malnovan petrolkampon por ke ĝi tenu sin en prospera kaj stabila produktivo; aliflanke ili ankaŭ ekspluatis kaj konstruis novan petrolkampon. La bravaj petrolaj laboristoj de Daking tagnokte batalis sur senhoma stepo. La diversnivelaĵaj gvidantoj iris en produktojn por partopreni en laboro kaj direkti produktadon kaj ankaŭ inĝenieroj kaj teknikistoj profundigis en la konstruejon kaj laboris kune kun laboristoj. Nur post tri monatoj la unuaj petrolputoj jam komencis ŝpruci nafton.


Ŝengli-petrolkampo estas alia granda petrolkampo konstruita ekde la jaro 1964. La vastaj laboristoj kaj oficistoj en tiu petrolkampo disvolvis amasan movadon de lerno de Daking kaj faris prospektoradon kaj boradon sur aliaj du novaj petrolkampoj en 1973. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ ili koncentris ĉiujn homojn kaj ekipaĵojn por finkonstrui kaj funkciigi unu post alia la nove boratajn petrolputojn kaj tiamaniere plenumis la tutjaran planon de nove pliigita naftoproduktivo antaŭdate je tri monatoj.

Dagang, la alia nova petrolkampo de nia lando, estas konstatita de enketado de pluraj jaroj, ke ĝi estas naftoriĉa loko, la areo estas vasta, ĝia naftotavolo dika kaj facile penetrebla, la produktokvanto alta kaj la kvalito de ĝia nafto relative bona. En 1973, oni komencis ekspluati ĝin samtempe kun intensa prospektorado.

Kun la ekspluatado de petrolfontoj ankaŭ la naturgaso kun abunda konservokvanto en nia lando estas pluapaŝe ekspluatata kaj utiligata. Siĉuan-baseno estas unu el la lokoj kun riĉa konservokvanto de naturgaso, en kiu oni trovis multajn tertavolojn kun nafto kaj gaso, kies konservokvanto estas multoble pli granda ol tiu mezurita antaŭ la granda kultura revolucio.



Konstruantoj de Dagang-petrolkampo



La finkonstruita parto de la porpetrola kajo de Kinhuangdaŭ-haveno ekfunkciis.



Angulo de Taŭpu

Utiligi Malutilaĵojn por la Popolo

— Notoj pri media protekto de la Taŭpu-a industria kvartalo de Ŝanhajo

de HIAŬ HJUEŜENG

LASTATEMPE mi vizitis la Taŭpu-an kemiindustrian kvartalon de Ŝanhajo. Nun mi prezentas al vi, kiel oni tie utiligas la tri forĵetaĵojn (gason, likvaĵojn kaj skorion) kaj protektas la medion.

RACIA DISLOKIGO DE FABRIKOJ

La Taŭpu-a industria kvartalo situas en la nordokcidenta antaŭurbo de Ŝanhajo. Tie troviĝas pli ol 30 fabrikoj, kiuj ĉefe produktas kemiaĵojn.

La tri forĵetaĵoj ellasitaj de kemiaj fabrikoj plej facile malpurigas medion kaj malutilas al kresko de vegetaĵoj kaj sano de popolanoj. Sed, dum la vizitado al tiu kvartalo mi vidis, ke bone kreskas verdaj legomoj sur apudfabrikaj kampoj

kaj diversaj arboj kaj floroj en la fabrikoj. La laboristoj kaj kamparanoj ĝoje laboras.

Kamarado de la administra sekcio de la tri forĵetaĵoj diris al mi, ke la Taŭpu-a industria kvartalo formiĝis de 1954 ĝis 1960. La plejparto de tieaj fabrikoj estis antaŭe en la interno de la urbo. Antaŭ la Liberiĝo, ili estis malgrandaj kun malbonaj ekipaĵoj kaj serioze malpurigis medion de la urbo.

En la komenco post la Liberiĝo, en la tuta Ŝanhajo troviĝis pli ol 1,000 fabrikoj, kiuj serioze malpurigis medion. Antaŭ la Liberiĝo, imperiistoj kaj kapitalistoj klopodis nur por ĉasi altan profiton, sed tute ne zorgis racion dislokigon de industriaj entreprenoj kaj protekton de media higieno. Ili laŭ-

vole okupis terenon por konstrui fabrikojn en loĝkvartaloj. Tiuj fabrikoj kun malvastaj laborejoj, malbonaj ekipaĵoj kaj postiginta produkta teknologio tute ne povis trakti la tri forĵetaĵojn, tiel ke la ĉiutage ellasita granda kvanto da fumo, polvo kaj venena gaso disvastiĝis konstante super la fabrika ĉirkaŭaĵo. La malpura akvo elfluinta detruis kloakojn kaj korodis bazojn de loĝdomoj. Vastaj amasoj de laborantaj urbanoj longe vivis en tia cirkonstancaro, kaj multaj el ili suferis de malsanoj, iuj eĉ perdis sian vivon.

Nelonge post la Liberiĝo, sub la zorgo de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ Zedong, la popola registaro de Ŝanhajo komencis fari plenableksan planon por reformi la malnovan urbon laŭ la principo de disvolvo de la nacia ekono-

mio kaj la urbokonstrua postulo “servi al la produkto kaj la laboranta popolo”. Oni plene utiligis kaj disvolvis la rolon de la malnova industria bazo, kaj samtempe laŭplane translokgis unujn post aliaj fabrikojn, kiuj serioze malpurigis la medion, al la antaŭurbo por la media protektado. Krom tio oni faris al ili kunigon, reorganizon kaj teknikan reformon. Samtempe konstruiĝis nombro da novaj industriaj entreprenoj. Ĝuste tiel paŝon post paŝo stariĝis en la tuta urbo 15 novaj kvartaloj de industrioj kemia, elektra, instrumenta, metalurgia, petrola k.a. La Taŭpu-a kvartalo estas unu el ili.

Tiuj novaj industriaj kvartaloj ŝanĝis neracian dislokiĝon de fabrikoj en la malnova Ŝanhajo kaj faris aktivan kontribuon al protekto kaj plibonigo de la urba medio kaj sano de la popolo.

Laboristoj de la Leda Fabriko Hongguang en Taŭpu-kvartalo ekzamenas la kvaliton de traktita eluzita likvaĵo.



KOMUNA KLOPODO POR PROTEKTI MEDIAN PURECON

Post la stariĝo de la Taŭpu-a industria kvartalo, ĉiuj fabrikoj konstruis unu post alia instalaĵojn por trakti la tri forĵetaĵojn kaj per tio plibonigis la kondiĉojn de laboro. Tamen kun rapida disvolviĝo de produkto la tri forĵetaĵoj de la fabrikoj plimultiĝas tagon post tago. Sed, kiel oni povas senĉese preventi kaj elimini malpurigon de la tri forĵetaĵoj al la medio de la antaŭurbo, tio estas nova solvenda problemo por ĉiuj fabrikoj.

Kamarado Ju Janji, membro de la partia komitato de la Dua Medikamenta Fabriko kaj respondeculo de la media laboro, rakontis al mi jenan aferon:

En la unua duonjaro de 1970, la rizplantoj de 33.3 hektaroj de kelkaj brigadoj ĉirkaŭ la Dua Medikamenta Fabriko flaviĝis kaj velkiĝis en malsamaj gradoj dum sia spikiĝo. Post esplorado oni trovis, ke la

malgranda rivero apud la fabriko por irigacii rizkampojn estis malpurigita de uzita akvo ellasita de la fabriko.

Informiĝinte pri tio, kamaradoj de la administra sekcio pri la tri forĵetaĵoj donis grandan atenton al ĝi kaj tuj petis respondeculojn de la Dua Medikamenta Fabriko kaj aliaj fabrikoj kune observi la kampojn por solvi la problemon. Ili ĉiuj esprimis: Niaj fabrikoj estas socialismaj entreprenoj. Tial ni devas ĉiam konsideri la intereson de la popolo kaj rapide eviti malpurigon de la tri forĵetaĵoj al la rivero por krei bonajn kondiĉojn por agrikultura produkto.

Sed, la fabriko havas specialan tublion por konduki uzitan akvon. De kie enfluis tia akvo en la riveron? Por trovi la kaŭzon, laboristoj de la Dua Medikamenta Fabriko faris ĉiuf flankan kaj detalan ekzamenon al ĉiuj tublinioj de la fabriko. Oni rimarkis, ke kun rapida disvolvo de produkto en la lastaj jaroj la uzita akvo rapide



Ekzamenado de aero de laborejo en la Unua Kemifibra Fabriko de Ŝanhajo en Taŭpu-kvartalo



La artrezina laborejo de la Presinka Fabriko de Ŝanhajo reprenis aluminian hidroksidon el eluzita likvaĵo.

plimultiĝas, sed riparado de la tublinioj ne povis atingi tian rapidecon. Pro tio, iuj kloakoj komencis difektiĝi kaj liki, tiel ke parto de la uzita malvarmigita akvo miksiĝis kun malpura akvo kaj fluis en la riveron.

Trovinte la kaŭzon, laboristoj de la fabriko tagnocte faris riparadon al la difektitaj kloakoj. Aliaj fabrikoj proksimaj ankaŭ sendis laboristojn kun iloj por helpi ilin en riparado. Dank' al komuna klopodo ĉiuj kloakoj de la fabriko estis rapide riparitaj. La uzita malvarmiga akvo kaj la malpura akvo fluas aparte laŭ siaj propraj tublinioj. Kaj post dragado de la rivero la akvokvalito pliboniĝis.

En la akompano de kamarado Ju mi iris por rigardi la riveron. Montrante la riverdigon masonitan per ŝtonoj ĉe la fabriko li diris al mi: "Por ke la akvo de la rivero estu pura, ni konstruis ŝtonan digon kun longeco de 300 metroj laŭlonge de la fabriko por ne lasi malpuran akvon penetri

en la riveron."

"Kian rikolton donis la rizplantoj en 1970?"

"Jes, bonan rikolton, la plej alta pomua produktokvanto de rizo (1 muo = 1/15 hektaro) atingis 350 kilogramojn, kaj la plej malalta pli ol 100 kilogramojn. En 1973, la pli ol 100 muoj da rizkampoj ĉe ambaŭ bordoj de la rivero produktis po 360-460 kilogramojn."

La afero okazinta en la Dua Medikamenta Fabriko atentigis aliajn fabrikojn de la Taŭpu-a industria kvartalo per tio, ke la laboro por trakti la tri forĵetaĵojn nepre devas akompani samtempe la disvolvon de produkto. Per tiu afero la sekcio vaste propagandis la postulon de la Centra Komitato de la Partio kaj la Revolucia Komitato de Ŝanhajo pri elimino de malpurigo de la tri forĵetaĵoj, tiel ke la medio estas plibonigita kaj la medioprotekta laboro pluapaŝe antaŭenpuŝita en tiu kvartalo.

SINTEZA UTILIGO POR TURNI MALUTILAĴON EN UTILAĴON

Kamaradoj de la nomita sekcio diris al mi: En kelkjara praktikado ili ekkonis, ke aktive disvolvi sintezan utiligadon estas grava vojo por aranĝi la tri forĵetaĵojn kaj protekti la medion. En la lastaj jaroj la laboristoj de tiu kvartalo sukcese faris pli ol 180 sintezajn utiligojn de la tri forĵetaĵoj. Ili proponis ke mi vizitu tiujn fabrikojn.

En du ĉambretoj de la Ŝanhaja Tanejo kiu prilaboras diversajn felspecojn, mi vidis, ke kelkaj laboristoj dekoktis neuzablajn felpecetojn kaj malordajn lanojn en la kaldronego por fari per tiu glueca likvaĵo herbicidon. Respondeculo zorganta la aferon diris, ke en la pasinteco krom parto de tiaj forĵetitaj felaĵoj, kiun kamparanoj forportis por fari sterkon, oni nur amasigis la ceterajn en angulo. En somero ili putriĝis, fetoriĝis kaj malpurigis la medion. Poste oni fine trovis rimedon por trakti ĝin.

En la Presinka Fabriko de Ŝanhajo la estro de la artrezina laborejo diris al mi: Por ne malpurigi medion, laboristoj sukcese trovis metodon repreni multajn materialojn el la forĵetita likvaĵo. Nun jam estas dekelkaj specoj da reprenitaj materialoj.

La malgranda Ĉangĝeng-a Sintezaj Kemia Fabriko estas starigita de komunumo kaj produktas fosfatan sterkon. La fabriko ne nur bone reprenas venenan gason ellasitan en produktado de fosfata sterko kaj prilaboras ĝin en 6 specojn de kemiaj reakciiloj kaj kemiindustriaj krudmaterialoj, sed ankaŭ sukcese produktas fosfatan sterkon per uzita sulfata acido anstataŭ neuzita, tiel ke la metodo por trakti uzitan sulfatan acidon estis trovita kaj ĝia malpurigo al medio estis evitata.

La Sesa Medikamenta Fabriko faris provojn en unu jaro por elimini malpurigon de feĉo al medio.

En la jarfino de 1965, la fabriko akceptis taskon fari novan medikamenton bezonatan de la ŝtato. Dum la produktado de la medikamento aperis oleeca feĉo, kiu havas akran odoron kaj fortan korodecon, kaj tiam oni ankoraŭ ne povis trovi efikan metodon por trakti la feĉon. Por ke la feĉo ne malpurigu medion, la laboristoj envazigis ĝin kaj post longa tempo akumulis pli ol 7,000 tiajn vazojn. Tio fariĝis problemo neniel solvebla por la fabriko.

Sed ĉiu ajn afero povas esti konata. Sub la gvido de la partia komitato de la fabriko laboristoj kaj teknikistoj faris diversajn eksperimentojn.

Iufoje, kiam ili analizas elementojn de strukturo de la feĉo, ili trovis, ke la feĉo havas efikecon kontraŭ la malsano de rizplantoj *Piricularia oryzae*, kion certigis koncerna instanco per ekspertizo. Sub la helpo de frataj unuoj, ili komencis provfabriki fungicidon kontraŭ la malsano kaj sendis ĝin al dek gubernioj kaj ĉirkaŭaj produktaj brigadoj por provo. Post ŝpruco de la fungicido la malsanaj rizplantoj denove verdiĝis. Kamparanoj ĝoje nomas la fungicidon "reverdilo de rizplantoj". De tiam la feĉo ne plu malpurigas medion.

La laboristoj de la Taŭpu-a kvartalo trafe diris: "Nur se ni kuraĝas praktiki kaj apliki sintezan utiligon, ni certe povas turni la tri forĵetaĵojn en valoraĵojn por la popolo."

Nun, ĉiuj fabrikoj de la Taŭpu-a kvartalo ne nur komencis kunlaboradon pri sinteza utiligo de la tri forĵetaĵoj, sed ankaŭ disvastigis tiun metodon al aliaj fabrikoj de Ŝanhajo, tiel ke pli kaj pli multiĝas la metodoj de elimino de malpurigo de la tri forĵetaĵoj kaj plibonigo de medio.

Vastaj arbaroj sur sabloamasoj

EN la pasinta vintro ni vizitis Dajigianfang, la sablofiksan kaj forstuman bazon de la forstuma eksperimenta stacio de Ĝanggutaj de Liaŭning-provinco. Kvankam la tero jam estis kovrita de neĝo kaj glacio, tamen smeraldaj pinarbaroj de la eksperimenta stacio firme staris en la frosta neĝvento. Nia aŭto kuris laŭ la kontinue ondanta forsta zono. Fingre montrante la forstozonon ekster fenestro de la aŭto, respondeca kamarado de la stacio diris, ke antaŭ 20 jaroj ĉi tie estis moviĝantaj sabloamasoj en vasteco. Ĉiufoje, kiam venis venta sezono, ruliĝis flava sablo, kaj sabloamasoj sin movantaj en vento kvazaŭ ferocaj "flavaj drakoj" englutis pecon kaj pecon da agroj, plenigis putojn kaj ensabligis domojn, kio kaŭzis seriozan minacon al la agrikultura produktado kaj la vivo de la kamparanoj.


Ĝanggutaj sin trovas en nordokcidenta parto de Liaŭning-provinco kaj estis vasta sablejo. Post la Liberiĝo la tieaj kamparanoj fariĝis mastroj de la ŝtato kaj arde deziris ŝanĝi la postiĝintan fizionomion de sia loko. Por radikale likvidi la plagon kaŭzitan de sablovento, ŝanĝi la naturan medion kaj disvolvi agrikulturan produktadon, la Partio kaj registaro fondis sablofiksan kaj forstuman eksperimentan stacion en tiu regiono en 1952 kaj disvolvis amasajn eksperimentojn pri forstumo. En la pasintaj 21 jaroj, sub la gvido de la partia filio la kadroj, laboristoj kaj oficistoj de tiu stacio venkis multajn malfacilojn, faris centojn da eksperimentoj kaj observadoj kaj fine ekposedis leĝojn de movado de sabloamasoj kaj ŝanĝiĝo de klimato, trovis multajn metodojn de sablofikso kaj forstumo kaj elkulturis multajn bonajn speciojn de arboj, per kio

ili faris kontribuon al la ŝtato.

Bridi sablejon estas nova speco de scienca laboro de nia lando kaj ankaŭ nova laboro por la laboristoj kaj oficistoj de la stacio. Tamen ili scias, ke sperto devenas de praktiko. Komence ili plantis poplojn, salikojn, ulmojn kaj morusarbojn sur milde leviĝantaj deklivoj de moviĝantaj sabloamasoj kaj en malaltaj lokoj kie ne tiel furiozis vento. Tio estis ilia unua eksperimento. Tamen en kelkfojaj ventegoj granda parto de la arbedo estis detruitaj. Poste laŭ la propono de tieaj kamparanoj ili kolektis multajn herbosemojn sur nemoviĝantaj sabloamasoj kaj semis ilin en pluva sezono sur sabloamasoj moviĝantaj. Tio estis ilia dua eksperimento. Post iom da tempo aperis verdaĵo sur la sabloamasoj. Estis domaĝe, ke ŝtormo forportis la herboĝermojn. Tamen ili ne deprimiĝis kaj daŭrigis obstine siajn eksperimentojn kaj observadojn.

Kaprica estis la tiea klimato. Sableroj ekmoviĝis, kiam la rapideco de vento estis kvin metroj po sekundo; kaj momenton poste la levita flava sablo jam vualis la ĉielon kiam la rapideco de vento atingis 25 metrojn po sekundo. Somere la temperaturo de sablosurfaco altis je pli ol 50° C, tiel ke estis malfacile por homoj kaj brutoj paŝi sur ĝi. Tamen la laborantoj de la stacio ne estis timigitaj de tiuj abomenindaj naturaj kondiĉoj. Ĉu en sablofuriozanta printempo, ĉu en varmega somero aŭ en frosta vintro ili daŭre faris detalan observadon kaj mezuradon pri movado de sabloamasoj kaj hidrologio, kaj ili akiris grandan kvanton da materialoj kaj unuapaŝe konis leĝojn de movado de sabloamasoj. Por trovi vegetalojn taŭgajn por fiksi sablon, ili faris pli ol 10 longajn marŝojn sur

Sabloamasoj ne reformitaj





Sciencistoj kaj teknikistoj esploras la kreskadon de mongolaj ruĝaj pinoj sur sabloamaso.

sablejo por esploro. Kune kun junaj teknikistoj iu inĝeniero kun aĝo de pli ol 60 jaroj esploris ĉiujn sabloamasojn sur zono longa je 70 kilometroj norde de Ĝanggutaj. Ili trovis specon de arbedo sur sabloamasa deklivo frontanta al vento kaj aliajn specojn de arbedoj sur malsamaj sabloamasoj taŭgaj por fiksi sablon. Poste ili plantis tiujn vegetalojn sur malsamaj lokoj de moviĝantaj sabloamasoj por fari eksperimenton pri sablofikso. Sukcesis la eksperimento kaj fiksiĝis la moviĝantaj sabloamasoj de Dajigianfang.

La sukceso de sablofikso metis bazon por plua-paŝa reformo de naturaj cirkonstancoj. En siaj eksperimentoj ili trovis, ke poploj, salikoj, ulmoj kaj morusarboj plantitaj de ili sur sabloamasoj kreskis tre malrapide kaj iom post iom velkiĝis pro sekeco kaj malfekundeco de la sablejo. Kiaj arboj konformas al tiaj kondiĉoj? En sia enketado en montregionoj kaj arbaroj sur sablejo ili rimarkis, ke nemalmultaj pinoj kun prospera foliaro kreskis sur rokmuoj kaj iliaj radikoj penetris en ŝtonfendojn. Tio montras, ke pinoj povas kreski en sekeco kaj malfekunda grundo, kaj granda parto de ili kun nefalaj folioj estas ĉiam verdaj. Ili bone efikas por bari venton, kaj estas vaste uzataj pro la bona kvalito de sia ligno. Ili do kuraĝe plantis pinarbidojn sur sabloamasoj.

Printempe de 1955, ili plantis 2,000 arbidojn de pinoj en sablofiksa regiono, tamen nur du el

ili plue vivis. Malsukcesis la eksperimento, tamen ĝi pruvis, ke en sablejo povas kreski pinoj. Por koni la karakteron kaj kreskajn leĝojn de pinoj ili plantis ilin en malsamaj lokoj de sabloamasoj por fari observadon kaj komparon. Teknikistoj portis siajn litaĵojn al la loko por zorgeme flegi la arbidojn. La arbidoj estis faligitaj de vento, ili restarigis ilin. La arbidoj estis kovritaj de sablo, ili elsabligis ilin. Dank' al sia diligenta laborado de sennombraj diurnoj ili fine atingis sukceson. Ĉifoje ili plantis 1,000 arbidojn kaj 90% el ili restis vivaj. Poste ili plue resumis sian sperton kaj plantis pinarbidojn sur ĉiuj sabloamasoj. Ni vidis, ke la plej altaj pinoj jam altas je 10 metroj kaj la ordinaraĵoj je ĉirkaŭ 7 metroj. La moviĝantaj sabloamasoj sterilaj en la pasinteco nun fariĝis vasta pinarbaro kun smeralda verdeco.

Por disvastigi sian sperton, la teknikistoj de la eksperimenta stacio sub la gvido de la komitato de la partia filio iris al la ĉirkaŭaj komunumoj kaj brigadoj kaj starigis 32 punktojn por sablofikso kaj forstumo. Helpate de ili multaj komunumoj kaj brigadoj transformis moviĝantajn sabloamasojn en pinarbarojn kaj fruktoĝardenojn. En Vugia-brigado kiun ni vizitis, prosperaj pinarboj kreskas sur sabloamasoj kun areo de 300 hektaroj, kaj apude oni plantis pli ol 2,000 fruktajn arbojn. En Linhaj-brigado je 10 kilometroj fore de la stacio ni vidis, ke la vasta tero estas dividita de forstozonoj en bonordajn kaj belajn kampojn. La brigadestro

diris al ni: “Kun tiuj forstozonoj ni ne plu timas sabloventon.”

La reformo de sabloamasoj kaj starigo de forstozona reto ne nur ŝanĝis la naturan fizionomion de Ĝanggutaj, sed ankaŭ multe altigis la produktokvanton de greno. Ĝanggutaj, kiu antaŭe ne produktis fruktojn, nun fariĝis unu el la bazoj de la gubernio abunde produktantaj pirojn, vinberojn kaj pomojn. La produktokvanto de tieaj fruktoj okupas pli ol kvaronon de la totala produktokvanto de la tuta gubernio. La bezono de ligno de la brigado kaj ĝiaj komunumanoj por domokonstruado jam povas esti fundamente kontentigita per memprovizo. La detranĉitaj branĉetoj estas uzataj de la komunumanoj kiel hejtajo.

La sukceso de la eksperimenta stacio de Ĝanggutaj altiris atenton de multaj koncernaj sciencaj institucioj de la tuta lando. Ili amase venis tien por rigardi kaj lerni kaj ankaŭ iuj fremdlandaj amikoj venis tien por esplori. Mongolaj ruĝaj pinoj plantitaj sur moviĝantaj sabloamasoj multe interesis la vizitantojn, ĉar tiaj arboj povas elteni sekecon kaj malfekundecon de grundo kaj ĝia ligno estas bonkvalita. Oni postulis, ke ili ne nur prezentu spertojn, sed ankaŭ donu helpon per livero de arbidoj de tiu specio.

Liveri arbidojn kaj semojn de mongola ruĝa pino al diversaj lokoj fariĝis glora tasko de la eksperimenta stacio. Ĝiaj laborantoj pensis: “Ni ne nur povas konkeri sablejon de Ĝanggutaj, sed ankaŭ devas fari kontribuon por jungi sablejojn de la tuta lando.” Grandkvante kulturitaj arbidojn de mongola ruĝa pino estis nova laboro por la stacio. Kun obstina

spirito de la pino iuj laborantoj de la stacio iris al la Granda Hing-an-montaro kaj Ĉangbaj-montaro, kie multe kreskas tiaj pinoj, por fari esploron, kaj aliaj daŭre akumulis spertojn en malsamaj sezonoj kaj malsamaj klimatoj. Fine ili resumis 12 rimedojn pri elektado de arbidkultivejo, flegado de semoj kaj arbidbedoj kaj protekto de arbidoj dum vintro kaj elkulturis grandan kvanton da arbidoj. Ĝis nun ili jam liveris 65,000,000 arbidojn al aliaj lokoj. Nun tiuj arbidoj jam kreskas en la orienta montregiono, okcidenta sekeca zono kaj nordokcidenta sablejo de Liaŭning kaj en Hingiang, Gansu, Interna Mongolio kaj kelkaj aliaj provincoj.

Riĉa rikolto de fruktoj



Prospera arbaro de mongolaj ruĝaj pinoj



Kien la Rubo?

SAME kiel aliaj urbegoj, Pekino estigas ĉiutage grandan kvanton da rubo de vivo kaj industrio. Sed, sur ĝiaj stratoj kaj stratetoj aŭ en fabrikoj kaj minejoj, ĉie regas bona ordo kaj pureco. Iuj fremdlandaj amikoj, precipe tiuj kiuj vizitis ĝin antaŭ la Liberiĝo kaj vidis propraokule tiun ĉi rubozan urbon, demandis senescepte: “Kien iris la rubo kaj forĵetaĵoj?”


Respondo al tio estas facile trovebla. Donu iomete atenton kaj oni povas rimarki, ke tie ĉi multaj forĵetaĵoj estas utiligataj, kaj rubo fariĝis unu el la ĉefaj specoj de sterko por antaŭurbaj kampoj.

Statistiko diras, ke en 1972 Pekino aĉetis 300,000 tunojn da ferrubo, eluzitaj neferaj metalaĵoj, vitropecoj, pneŭmatikaĵoj k.a. kaj el la pli ol 2,700 tunoj da rubo de ĉiutaga vivo troviĝas multe da eluzitaj ĉifonoj, ŝuoj, paperpecoj, diversaj ostoj k.a.

Estas imageble, ke tiuj rubaĵoj ankoraŭ utiligeblaj, se neĝustatempe traktataj kaj utiligataj, ne nur kaŭzos malŝparon sed ankaŭ malbone influos la aspekton de la urbo kaj la higienan staton, eĉ obstrukcos vojojn, malhelpos produktadon kaj certe fariĝos unu el la publikaj malutilaĵoj.

Tion bone scias la pekinaj aĝuloj. Ili ankoraŭ memoras jenan diron: “Surstrate polvotavolo dikas je tri futoj en serena tago, kaj fariĝas koto je pluveto.” Tiam ambaŭflanke de Tian-anmen-pordego estis po amaso da rubo kaj la rubamasoj ĉe la piedo de la orienta kaj okcidenta urbomuregoj estis tiel altaj, ke laŭ iliaj deklivoj infanoj povis ascendi la muregojn. La nuna Erlong-strato, antaŭe nomata Erlong-kavo, estis kavo kun akvo profunda je pluraj metroj. Kaj tiu kavo poste fariĝis Erlong-monto post enĵetado de rubo. Tiam en la tuta urbo estis multe da tiaj montetoj. Tra pluraj dinastioj,

Trakta stacio de eluzita likvaĵo en Pekino



Parto de Tiankiaŭ kie estis lageto plena de malpura akvo, nun fariĝis nova loĝ-kvartalo.



tiuj montetoj formiĝis el rubo de ĉiutaga vivo. Ĉiusekure kuloj kaj muŝoj naskiĝis ĉe ili kaj disportis epidemiojn kaj multe minacis la vivon de la urbanoj.

La Kompartio kaj la popola registaro tre zorgas la sanon de la popolo. Post la liberiĝo de Pekino en 1949, la popolamasoj estis tuj mobilizitaj al disvolvo de patriota higiena movado, antaŭ ĉio, por forporti rubon. En tiu jaro, 250,000 kubmetroj da rubaĵoj estis forportitaj.

Por protekti la purecon de Pekino kaj sanon de la urbanoj kaj servi al produktado, la lokaj partia organizo kaj registaro aplikis dum la lastaj pli ol 20 jaroj multajn rimedojn por plifortigi la traktadon al rubo kaj kolektadon de eluzitaĵoj kaj forĵetaĵoj. Specialaj institucioj estis starigitaj en Pekino por gvidi tiujn laborojn, nome transportadon de rubo kaj fekaĵoj, akvumadon de stratoj kaj balaadon de neĝo. La Pekina Komitato de Patriota Higiena Movado gvidas la amasan patriotan higienan movadon. Laŭ la granda alvoko de Prezidanto Maŭ **“Mobiliziĝu por vivi higiene, malmultigi malsanojn kaj levi la nivelon de sano”**, la Pekina Komitato edukas kaj mobilizas ĉiujare per kunvenoj, filmoj, lumbildoj kaj fotoj amasojn al patriota higiena movado kun prevento de malsanoj, ekstermo de malutilaĵoj kaj purigo de la medio kiel ĉefa laboro. Urboskala higiena movado okazas ĉiujare 7-8 fojojn,

tiam milionoj da amasoj balaas stratojn, stratetojn kaj forigas amasiĝintan teron kaj malorde amasiĝintajn objektojn. Krome, la vasta amaso, kunagante kun purigistoj, faras balaadon por teni purecon de la medio.

Plejparto de la rubo de ĉiutaga vivo estas transportita al sterkejoj de antaŭurbaj popolaj komunumoj. Ekzemple la sterkejo ĉe Liangmakiaŭ de Ĉaŭĵang-kvartalo preparas per tia rubo ĉiujare ĉ. kvar tunojn da sterko, kiu ludas grandan rolon en altigo de agrikultura produktado. La aliaj ruboj kiel ĉifonoj, eluzitaj ŝuoj, paperpecoj, ladskatoloj, estas same kiel industria rubo aĉetita de specialaj kolektantoj por sinteza utiligado.

En la komenca periodo post la Liberiĝo, multaj komercaj fakoj starigis respektive sian aĉetan stacion por kolekti eluzitaĵojn. En 1957 tiuj stacioj kuniĝis kaj formis la Pekinan Kompanion de Materialaĉetado por plifortigi la gvidadon kaj plivastigi la aĉetadon. La kompanio starigis en ĉiuj kvartaloj siajn staciojn, punktojn kaj rondirajn grupojn kun puŝĉaro por fari aĉetadon sur stratoj kaj stratetoj. Ankaŭ la antaŭurbaj gubernioj starigis tiajn aĉetadojn.

Same kiel konservado de pureco de stratoj, la kolektado de eluzitaĵoj estas kune farataj de specialaj laborantoj kaj vastaj popolamasoj. En

multaj loĝkvartaloj, loĝantoj meminitate prenas sur sin la de-tempo-al-tempo kolektadon de eluzitaĵoj alportitaj de loĝantoj. La lastaj ĉiam aparte metas balaĵojn dis de utiligeblaj eluzitaĵoj por kune kun purigistoj fari purigadon kaj kolektadon. Vespere, ili ŝutas rubon en difinitan lokon, por ke oni forportu ĝin, kaj metas eluzitaĵojn en sian specialan keston por poste vendi ilin kiam ili fariĝas multaj. En multaj elementaj kaj mezgradaj lernejoj, unu el la aktivadoj de lernantoj estas helpi laboristojn transporti rubon kaj kolekti eluzitaĵojn. Lernantoj jam kutimiĝis doni trovitan ferrubon al sia lernejo.

La kolektitaj eluzitaĵoj fariĝis unu el la fontoj de produktaj materialoj de iuj pekinaj fabrikoj. Ekzemple, malpezindustriaj produktaĵoj fabrikas ludilojn kaj ŝelojn de termosoj el ferplataj postrestaĵoj; riparejoj riparas difektitajn produktojn kaj akcesoraĵojn; ferrabotaĵoj estis portitaj al fandejo. La krudaj materialoj de iuj specialaj fabrikoj, kiaj ostogravuraĵejo, ekstraktejo de raraj metaloj, ĉiuj estas kolektitaj eluzitaĵoj. La Preparejo de Ostgluaĵo kaj Graso en la suda antaŭurbo de Pekino produktas ostgluaĵon, felgluaĵon, reuzebligita lubrikoleon kaj aliajn 20 specojn el diversaj ostoj kaj eluzita lubrikoleo. La kvalito de tia reuzebligita lubrikoleo atingis la ŝtatan normon de ordinara lubrikoleo kaj povas esti uzata kiel bona lubrikoleo, kaj la ostgumo estas gluaĵo, kiu servas kiel nemanĝebla materialo por kemiindustrio, tinkturado,

ŝpinado, teksado, presado, farado de lignaj mebloj kaj diversaj ĉiutagaj bezonaĵoj.

En la lastaj jaroj, en fabrikoj kaj minejoj, de kie fontis industria rubo, stariĝis sinsekve dependaj laborejoj kaj dependaj malgrandaj fabrikoj kun familianoj de la laboristoj kaj oficistoj kiel ĉefaj membroj, kiuj fabrikas pretajn varojn aŭ prilaboras maŝinpecojn el postresta materialo kiel kruda materialo. Tiamaniere, novaj krudaj materialoj estis ŝparitaj, kaj samtempe rubo estas malpliigita kaj pureco estas konservata. Ni prenu la Pekinan Fabrikon de Elektraj Maŝinoj kiel ekzemplon. La fabriko estas granda kaj multon produktas, tial la restigitaj materialoj, precipe siliciŝtalaj tabuletoj, estas multaj. En la pasinteco ili estis nebone utiligitaj kaj aranĝitaj, tiel ke ili amasiĝis ĉie kaj malhelpis la trafikon kaj produktadon. En 1970, la gvidantaro de la fabriko aprobis la proponon de laboristoj kaj organizis familianojn de laboristoj kaj oficistoj por starigi malgrandan fabrikon, kiu prilaboris siliciŝtalajn tabuletojn kaj aliajn postrestajn materialojn en elementojn de rektifiloj kaj aliajn objektojn. La netaŭgaj materialoj estis liveritaj al koncerna fako, gisaĵeroj servas kiel kruda materialo de medikamentpreparejo kaj tinkturpreparejo. En la lastaj jaroj, ili produktis nemalmultajn elementojn ne nur el plejparto de la postrestaj materialoj sed ankaŭ el multjare apude amasigitaj. Multaj fabrikoj kaj minejoj nun ĉie aspektas pure kaj orde pro bona traktado de eluzitaj kaj malnovaj materialoj.

Aŭskultu

Esp-an Disaŭdigon de Radio Pekino

Por Eŭropo

Pekina Tempo	Sabato k Dimanĉo 4:00—4:30
GMT	Vendredo k Sabato 2:00—2:30
Ondoj(m)	43 33 31

Por Japanio, Koreio

Pekina Tempo	Sabato k Dimanĉo 19:00—19:30
Ondoj(m)	47 40
Por Sudorienta Azio	
Pekina Tempo	Sabato k Dimanĉo 20:30—21:00
Ondoj(m)	30 25

Postlabora Vivo de Laboristoj de lu Fabriko

KIEL la laboristoj de nia lando pasigas sian tempon post la okhora diligenta laboro? Por respondi la demandon ni vizitis la Dongfanghong-an Silkteksejon de Suĝoŭ de Giansu-provinco.

La Dongfanghong-a Silkteksejo kun historio de pli ol 50 jaroj antaŭe estis nomita Dongvu-a Silkteksejo. La tradiciaj produktaĵoj de la teksejo estas bone akceptataj de klientoj en kaj ekster la lando. Post la Liberiĝo, la produkto de tiu teksejo rapide progresis, la nombro de laboristoj kreskis de 99 ĝis pli ol 2,000 kaj la specoj de produktaĵoj pliiĝis de 7 ĝis pli ol 250. La nuna taga produkto-kvanto de silkaĵoj de la teksejo egalas la jaran produktokvanton antaŭ la Liberiĝo.

Sur la bazo de rapida disvolviĝo de produkto la teksejo starigis bibliotekon, legoĉambron, tablotenisan ĉambron, ŝakĉambron kaj korbopilkan kampon. Ĝi organizis laboristojn por lerni legoscion kaj teknikon, fari amatorajn artajn prezentadojn kaj okazigi konkursojn de poemdeklamo, rakontkunvenojn kaj koncertojn. Ĉio ĉi tio kreis bonajn kondiĉojn por riĉigi la postlaboran vivon de laboristoj. Post la diligenta laboro, ili povas partopreni en siaj ŝatataj aktivadoj.

MANIULO DE TEKNIKA RENOVIGO

Enirinte la legoĉambron, ni vidis, ke laboristoj absorbite legas librojn kaj ĵurnalojn. Sur la bretaro estas verkoj de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto Maŭ, diversaj ĵurnaloj kaj gazetoj, rakontaj bildserioj k.a. Pli okulfrapa estas murgazeto, en kiu estas publikigitaj recenzoj kaj komprenaĵoj de laboristoj post legado.


Kamarado de la biblioteko diris al ni, ke la biblioteko havas siajn konstantajn legantojn, kiuj prenas legadon kiel sian amatoran ŝaton. Li aparte prezentis al ni "maniulon de teknika renovigo" Ĝu Ĉanglin, kiu laboris jam 20 jarojn kiel elektristo

en la teksejo kaj diligente studas teknikon. Kiam novaj numeroj de libroj de sciencoj kaj tekniko venis al la biblioteko, li ĉiam estas la unua leganto. En la lastaj jaroj, li faris plurajn teknikajn renovigojn kombinante iujn sciencajn materialojn kun sia sperto de praktiko. Nun li legas "Transistoran Cirkvito" kaj aliajn librojn kaj esploras post laboro novan metodon de aŭtomata navedŝanĝo.

Krome li rakontis al ni, kiel Sun Ĝikiang, sekretario de la Komunisma Junulara Ligo de la teksejo, persistas en lernado de la japana lingvo. Kvantam li estas tre okupata, tamen li ĉiutage aŭskultas radiodissendan kurson de la japana lingvo kaj ĝin lernas unu horon ĉiutage. En dimanĉo li frekventis instruiston de altlernejo por peti helpon, tial li multe progresis en lernado de la japana lingvo.


Por kontentigi bezonon de iuj laboristoj, la teksejo funkciigis kursojn por legoscio kaj labordesegno, en kiuj lernas pli ol 100 laboristoj.

La amatora korbopilka teamo en ludado



Kiam ni venis al la amatora arta propaganda taĉmento, geaktoroj estis farantaj provludon. La taĉmento konsistas el pli ol 20 membroj. Prenante la realan vivon de la teksejo kiel siajn kreajn objektojn ili mem redaktas, reĝisoras kaj prezentas diversajn artajn programerojn. Ekzemple, la drameto "Nia Decido" estas redaktita laŭ bonaj faroj de iuj laboristoj en la teksejo kaj estas bonvena al laboristoj.

Ĝu Ĉanglin en biblioteko



Gin Gjunki kulturaj drogherbojn.



Post la laboro vigla atmosfero regas korbopilkan kampon. La vira korbopilka teamo de la teksejo akiris bonan sukceson en konkurso kun aliaj teamoj de tekstila branĉo de la tuta urbo.

Ŝakteamo gajnis ĉampionecon en matĉo kun aliaj teamoj de la branĉo. En la ŝakĉambro okazis matĉo de ŝakludo de la tuta teksejo. Rigardantoj amasiĝis ĉirkaŭ la ludantoj kaj la ludantoj streĉe cerbumadis por savi sin el malgajno. Ni vizitis pli-ol-30-jaran respondeculon de la ŝakteamo Ĉeng Juanĉi, kiu komencis ludi ŝakon de la aĝo de 7-8 jaroj. Li diris al ni, ke en la teksejo troviĝas multaj amatoroj de ŝako kaj ili ofte ludas partion post deĵoro. Post sia fondiĝo la ŝakteamo ofte faras amikcan matĉon kun ŝakteamoj de frataj unuoj en kaj ekster la teksejo.

EN HEJMO

Kiel laboristoj de la teksejo aranĝas sian vivon en hejmo post la laboro? Ni vizitis kelkajn laboristojn en iliaj hejmoj kaj trovis, ke ilia postlabora vivo estas riĉa kaj interesa.

La familio de hejtisto Sun Gikjuan havas kvar membrojn: Lia edzino laboras en preparejo de la teksejo, liaj du infanoj lernas en lernejo. Ilia vivo estas feliĉa. Post sia laboro li ofte verkas poemon kaj prozon por prikanti novajn homojn, novajn aferojn kaj novajn morojn de la teksejo. Ni vidis, ke sur lia tablo troviĝas nova versaĵo "Laboristoj kaj kamparanoj ligiĝas koron kun koro". La versaĵo komenciĝis jene:

*Fratas la laborist' kaj kamparan' en alianco,
Kiel du spikoj sur la sama riza planto.
Ili intimas kor' kun koro en sinligo,
Kiel la spikoj kun komuna la radiko.*

.....

Maljuna Sun diris, ke li iam partoprenis en la poemkonkurso okazigita de la teksejo. Verkado jam fariĝis lia amatora okupo.

En la malgranda korto de laboristo Gin Gjunki pompe floras ĉinaj rozoj kaj krizantemoj. Plantante florojn kaj herbojn, li diris al ni kun ĝojo, ke en festotago kaj ferio li ŝatas iri sur monton por kolekti diversformajn radikojn de umeo, ulmo kaj aliaj arboj por fari diversajn miniaturajn pejzaĝojn laŭ ilia natura formo. Pro vasta uzado de drogherboj en kuracado dum la lastaj jaroj, nun li transplantis ankaŭ diversajn sovaĝajn drogherbojn de montoj en sian korton. Montrante la transplantitajn drogherbojn li eksplikis al ni pri ilia naturo kaj kuraca efiko. Li ĝoje diris, ke li kuracis iujn malsanajn laboristojn per tiuj drogherboj.

kaj Bonstatigaj Aferoj

MULTAJ legantoj skribis al ni ke ni konigu al ili la laborasekuron kaj bonstatigajn aferojn de la ĉinaj laboristoj kaj oficistoj. En tiu ĉi limigita rubriko ni iom parolu pri tio al niaj legantoj.

Paŝo-post-paŝa disvolvo de la laborasekuro kaj bonstatigaj aferoj surbaze de disvolviĝo de la produkto estas politiko de la Partio kaj registaro de Ĉinio en longa periodo. Laŭ tio la entreprenoj, neproduktaj unuoj kaj ŝtataj institucioj de nia lando ĝenerale efektivigas laborasekuron. Ĉiuj laboristoj kaj oficistoj rajtas ĝui laborasekuron sendistinge de nacieco, religia kredo, aĝo kaj sekso.

La laborasekuro en Ĉinio inkluzivas diversajn flankojn kiel malsaniĝon, vundiĝon, invalidiĝon, akuŝadon, maljuniĝon kaj morton. La diversaj elspezoj por la asekuraj flankoj estas tute pagataj de la ŝtato kaj koncernaj entreprenoj, kaj la ĝuantoj ne bezonas pagi asekuran kotizon el sia salajro.

La laborasekuraj normoj en Ĉinio estas difinitaj kun konsidero pri la necesa materia helpo al la laboristoj kaj oficistoj, kiam ili estas maljunaj, malsanaj kaj perdintaj laborkapablon, kaj ankaŭ pri la ekonomiaj kondiĉoj de la ŝtato kaj iliaj kontribuoj al la ŝtato. Se iu el ili malsaniĝis kaj bezonas kuracadon por longa tempo, ili povas forlasi la laborpostenon kaj ricevi senpagan kuracon kaj 40% ĝis 100% de la salajro dum la kuracado laŭ ilia laboraĝo. Se iu ricevis vundon en laboro, li povas ricevi sian tutan salajron krom senpaga kuracado; gravedaj virinoj povas sin ekzameni, enhospitaliĝi kaj ricevi akuŝan flegadon senpage kaj la tutan salajron en la 56 feriaj tagoj por akuŝado; emeritaj laboristoj kaj oficistoj ĉiumonate ĝuas pension egalan al 50% ĝis 80% de iliaj salajroj laŭ iliaj laboraĝo kaj kontribuoj al la ŝtato; se iu el la laboristoj kaj oficistoj mortis en sia laborposteno, la familianoj kiujn vivtenis la mortinto, povas ricevi ĉiumonate monhelpon egalan al 25% ĝis 50% de la salajro de la mortinto.

Nun la ĉiujara elspezo de nia lando uzata por la laborasekuro kaj bonstatigaj aferoj de la laboris-

toj kaj oficistoj egalas al dekelkaj procentoj de la salajroj de la laboristoj kaj oficistoj.

Depost la Liberiĝo la ŝtato faris multajn bonstatigajn aferojn por la laboristoj kaj oficistoj, ekzemple, ĝi konstruis por ili grandan nombron da loĝdomoj, ĝenerale fondis manĝejojn, infanvartejojn kaj infanĝardenojn. La ŝtato monhelpas la laboristojn kaj oficistojn kiuj renkontas malfacilaĵojn en la vivo, kaj donas subvenciojn al komunaj manĝejoj.

En la lastaj pli ol dudek jaroj la ŝtato konstruis multajn loĝdomojn. Pekino konstruis loĝdomojn kun areo de pli ol 20 milionoj da kvadrataj metroj kaj krome riparis kaj rekonstruis multajn malnovajn domojn. En Ĉinio la lupago de domo estas tre malalta, ekzemple, oni pagas nur 0.12 juanon por 1 kvadrata metro de ordinara etaĝdomo en Pekino. Ĉiu pagas la lupagon por sia loĝejo nur per 3% ĝis 5% de sia salajro.

La ŝtataj institucioj, entreprenoj kaj neproduktaj institucioj ĝenerale starigis manĝejojn, infanvartejojn kaj infanĝardenojn kies instalaĵoj estas provizitaj de la ŝtato, kaj ankaŭ la salajroj de kuiristoj kaj vartistinoj estas pagataj de la ŝtato. La elspezo por akvo kaj elektro venas parte el la subvencio de bonstatigaj aferoj. Tial la manĝaĵoj estas malkaraj kaj la pago por vartado de infano estas malmulta.

Ĉiujare la ŝtato ankoraŭ speciale disponas sumon da mono por helpi tiujn laboristojn kaj oficistojn kiuj vivas en malfacilo. Tial la laboristoj kaj oficistoj kies familianoj malsaniĝis aŭ renkontis malfacilon je okazo de natura katastrofo, povas ricevi periodan aŭ provizoran monhelpon.

En la vasta regiono norde de Jangzi-rivero de Ĉinio la ŝtato donis specialan monon kiel alpagon al la laboristoj kaj oficistoj por ricevi varmon en vintro. En Pekino estas kvar malvarmaj monatoj en ĉiu jaro. Ĉiu laboristo kaj oficisto ricevas de la ŝtato kvar juanojn monate, sume 16 juanojn por la kvar monatoj kiel alpagon por varmigo de sia loĝejo.

Ekspozicio de Agrikulturo kaj Forstumo en Pekino

LASTATEMPE en Pekino okazis la Tutlanda Ekspozicio de Sciencoj kaj Tekniko de Agrikulturo kaj Forstumo. Ĝi manifestis la abundajn fruktojn akiritajn de nia lando de post la Granda Proleta Kultura Revolucio sur la fronto de sciencoj kaj tekniko de agrikulturo kaj forstumo.

ABUNDAJ FRUKTOJ

En la Halo de Semoj la rigardantojn multe interesis la veraj semoj de pli ol 500 diversaj bon-speciaj plantaĵoj de greno, koton, oleo, kanabo, moruso, teo, legomoj, tabako, fruktoj, drogherboj k.a. Tiuj objektoj koncentre spegulis la atingojn de nia lando en plibonigo de specioj de plantaĵoj.

Antaŭe Guangdong-provinco kulturis nur rizon de alta tigo, kiu estis facile klinebla de tajfuno. Por solvi la demandon Guangdong-provinco mobilizis pli ol 1,300,000 homojn al amasa scienca eksperimento kaj koncentris ĉiujn fortojn por selekti kaj disvastigi bonajn speciojn de rizo. Oni elkulturis kaj disvastigis nombron da bonaj specioj de rizo, kiuj estas malaltaj kaj malfacile klineblaj, povas elteni troan sterkon kaj doni abundan rikolton. Dank' al tiuj bonaj specioj la produktokvanto de rizo de la tuta provinco ĝenerale kreskis.

En la pasinteco rizo estis kulturata nur en suda Ĉinio dufoje en unu jaro. En la Granda Proleta Kultura Revolucio, por altigi la produktokvanton de greno la vastaj amasoj de komunumanoj klopodis por multigi tiajn kampojn sur kiuj oni povas kulturi grenplantojn dufoje en ĉiu jaro. Nun oni jam povas kulturi ĉiujare dufoje rizon aŭ kulturi tri specojn da plantaĵoj sur sama kampo en lokoj ĉe la norda latitudo de 32 gradoj. En norda kaj nordokcidenta Ĉinio kie antaŭe oni kutime kulturis unufoje en ĉiu jaro, oni provis kaj jam sukcesis kulturi kaj rizon kaj tritikon en unu jaro sur sama

kampo. Fronte al la nova situacio ke pli kaj pli multiĝis la kampoj sur kiuj oni kulturis dufoje aŭ trifoje, la sudaj provincoj elkulturis multajn bonajn speciojn de rizo kiuj maturiĝas en malsamaj tempoj, kiuj ludis aktivan rolon en firmigo de la nova kultura sistemo.

Stria rusto estas tre grava malsano minacanta tritikon de nia lando. Por solvi la problemon teknikistoj de la Nordokcidenta Agronomia Instituto en Ŝenhi-provinco k.a. agronomiaj institucioj faris esploron kune kun komunumanoj kaj elkulturis speciojn de tritiko kiuj estas imunaj kontraŭ rusto kaj donas bonan rikolton. Nun en nia lando rapide disvastiĝis la specioj imunaj kontraŭ rusto kaj la minaco de stria rusto estas fundamente eliminata kaj la produkto de tritiko multe kreskis.

La ekspozitaj objektoj, bildoj kaj modeloj montris, ke oni akiris novajn sukcesojn en scienca esploro pri grundo, sterko, agrikulturaj medikamentoj, plantoprotekto, forstumo, akva produktado, brutobredado, veterinara arto k.a. Rigardantojn tre interesis la temoj pri reformado de sala kaj alkala grundo, batalo kontraŭ sablo kaj vento, utiligo de supereco de krucitaj plantaĵoj, simpla metodo de farado de bakteria sterko, akupunktura anestezado al brutoj por operacio kaj bredado de pandaloj. La 342 temoj prezentataj en la ekspozicio kaj pli ol 1,500 superecaj specioj en agrikulturo, forstumo, brutobredado kaj fiŝbredado manifestis la ĝojindan situacion de sciencoj kaj tekniko de agrikulturo kaj forstumo de nia lando.

NEELĈERPEBLA ESTAS LA SAĜO DE LA AMASOJ

La bildoj de la ekspozicio spegulis emocian situacion ke la vasta laboranta amaso suriris la scenejon de sciencoj kaj tekniko de agrikulturo kaj forstumo. Miloj kaj miloj da specialistoj devenin-

taj de kamparanoj plene montris sian talenton en la kampo de scienca esplorado. Arde disvolviĝas sciencaj eksperimentoj kune farataj de kadroj, amasoj kaj teknikistoj.

Depost la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio la vasta amaso de kadroj kaj amasoj de la agrikultura fronto de nia lando armis sin per Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, kritikis la reviziisman linion de Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ k.a. Ili ŝanĝis la staton ke nur malmultaj homoj vegete faris sciencajn eksperimentojn. Nun vaste disvolviĝas la amasa aktivado de scienca eksperimento. En la lando multaj produktaj brigadoj kaj grupoj fondis kaj kompletigis organizojn de scienca eksperimento. Nemalmultaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj iom post iom formis sian reton de scienca eksperimento en la kvar niveloj de gubernio, komunumo, produktaj brigado kaj grupo. La grandnombraj tipoj prezentataj en la ekspozicio pruvis, ke nur amasa movado povas multe, rapide, bone kaj ekonomie disvolvi sciencojn kaj teknikon de agrikulturo kaj forstumo de nia lando.

La sperto de Fangceng-gubernio de Henan-provinco en ekstermo de fiinsektoj ege interesis la rigardantojn. En la pasinteco fiinsektoj grave detruis plantaĵojn. Por efike preventi kaj ekstermi fiinsektojn oni disvolvis en la tuta gubernio amasan laboron de observado, raportado, preventado kaj ekstermado. En la gubernio stariĝis 134 observaj kaj raportaj stacioj pri fiinsektoj de tri niveloj de gubernio, komunumo kaj brigado, kulturiĝis 5,800 kamparanoj kiel observantoj kaj raportantoj. Samtempe oni resumis multajn facile kompreneblajn proverbojn pri agrikulturo kaj disvastigis ilin en la tuta gubernio por popularigi sciojn pri observado, raportado kaj ekstermo de fiinsektoj. En la lastaj kelkaj jaroj, pere de la energia disvolvo de amasa movado la gubernio jam konis la estiĝon de pli ol 10 ĉefaj fiinsektoj kaj la metodojn de observado, raportado kaj ekstermo de la fiinsektoj, bridis la detruadon de la fiinsektoj kaj akcelis la agrikulturon.

Iuj rigardantoj tre laŭdis la demonstradon pri utiligo de metano. Malferminte valvon de metano

Angulo de la ekspozicio



oni eklumigis lampon kaj komencis kuiru manĝaĵojn. En la ekspozicio demonstris Jan Zeguj, kamparano-specialisto de la 9-a produkta brigado de Gifeng-komunumo de Ĝonggiang-gubernio de Siĉuan-provinco. Li diris al la rigardantoj, ke lia familio havas 6 homojn kaj bredas 2 porkojn. La metano preparita el fekaĵo de necesejo kaj porkejo miksitaj kun 1,000 kg. da herboj sufiĉas por kuirado kaj lumigado de lia familio. La fermentitaj fekaĵoj kaj herboj fariĝis bonega sterkaĵo. La preparado de metano estas simpla, malmulte kosta, praktikebla por ĉiu familio. Disvastigo de tio povas ne nur ŝpari hejtaĵon, liberigi laborfortojn, sed ankaŭ liveri bonegan sterkaĵon, mortigi ovojn de fiinsektoj kaj bakteriojn, kio estas utila al disponado de fekaĵo kaj al la sano de homoj kaj brutoj. Nun en Siĉuan tion disvastigas multaj lokoj kun necesaj kondiĉoj.

FARI SCIENCAN ESPLORADON

KUNE KUN LA AMASOJ

Multaj el la ekspozitaj objektoj kaj bildoj spekulis ankaŭ la novan moron, ke profesiaj teknikistoj de agrikulturo kaj forstumo de nia lando

Teknikistoj de la Keŝan-a Filio de la Agronomia Instituto de Hejlonggiang-provinco faris eksperimenton pri bonaj specioj de printempa tritiko.



iris en la amasojn por fari sciencajn esploradojn kune kun ili. Persistante en necesa esploro en laboratorio aŭ eksperimente multaj unuoj de scienca esploro fondis bazan punkton en la kamparo, faris sciencajn eksperimentojn kune kun tieaj kadroj kaj amasoj kaj akiris bonan efikon en sia ideologia reformado kaj scienca esploro. La Keŝan-a Filio de la Agronomia Instituto de Hejlonggiang-provinco plene utiligis siajn ekipaĵojn kaj teknikan forton, starigis interrilaton kun multaj komunumoj aŭ produktaj brigadoj, agis en strikta kunlaboro por disvolvi sciencajn eksperimentojn pri bonaj specioj de printempa tritiko. Ili starigis en la provinco pli ol 500 ekspertizajn punktojn pri specioj kaj varioj, dank' al kiuj ili rapidigis la ekspertizadon kaj levis ĝian nivelon. La teknikistoj profundigis en produktadon, lernis sperton de amasoj kaj pli klare konis la celon de plibonigo de specioj. Ili esploris kune kun amasoj teknikon de multobla generado de semo kaj rapidigis la disvastigon. En la lastaj jaroj ili plibonigis kaj disvastigis 20 diversajn speciojn de printempa tritiko kiuj povas elteni trosekecon kaj trohumidecon, ŝatas sterkon kaj donas stabile altan produktokvanton. Nun la areo de kampoj, sur kiuj oni kulturas la speciojn de printempa tritiko, okupas 80% de la tuta agraro de tritiko de la provinco, kio ludis gravan rolon en altigo de la produktokvanto de tritiko de la tuta provinco.

Iu foto tiris atenton de rigardantoj. Ĝi montras kamionon ekipitan per neŭtrona fonto. Dank' al neŭtrona radiado al fraĵo, oni povas ricevi grandajn kverkajn silkraŭpojn kaj dikajn kokonojn. La apliko de neŭtrona radiado en produktado de kokonoj estas frukto de kuna esplorado de komunumanoj kaj teknikistoj de la Dandong-a Silkraŭpa Instituto kaj la Ŝenjang-a Agronomia Instituto. De 1966 ĝis 1971 la teknikistoj de la du unuoj faris pli ol 100 eksperimentojn en 34 produktaj brigadoj kaj sukcesis. La teknikistoj de specialaj institucioj pri abelbredado kaj kadroj kaj komunumanoj de Ĉongking-gubernio de Siĉuan-provinco kune faris sciencajn eksperimentojn de utiligo de la supereco de abela kruciĝo kaj en du jaroj ili plibonigis ĉiujn esamenojn de la tuta gubernio.

Praktikado pruvis, ke nur kombiniĝo de la esplorado de teknikistoj kun la scienca eksperimento kaj produktado de la amasoj povas rapidigi la disvolviĝon de sciencoj kaj tekniko. Multaj teknikistoj modeste lernis de la amasoj, diligente studadis, kuraĝe praktikadis kaj sukcesis fari inventon en scienca eksperimento.

La Revolucia Moderna Pekina

Opero "Rododendra Monto"

En serioza situacio Ke Hiang kuraĝigas sin per instruoj de Komitatano Maŭ.





Ke Hiang admonas Lej Gang, ke li ne agu senpripense.



Ke Hiang donas klasan edukon al la kamparana memdefenda trupo kaj Lej Gang ekhavas klasan konscion.

La kamparana memdefenda trupo aspektas vicleplena post trejnado sub la gvido de la Kompartio. Ĝia estro Lej Gang aliĝinta al la Kompartio iom post iom maturiĝas en politiko.



Fronte al la sieĝo de malamikoj Ke Hiang restas aplomba kaj okazigas kunvenon de la partia filio por trovi rimedon venki la malamikojn.





Tian Dagiang (la antaŭa) brave oferis sin sur la revena vojo al la monto post arda batalo.

Ke Hiang pacience edukas kaj helpas Lej Gang kaj montras, ke nur sub la ĝusta gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kamparanaj armitaj fortoj povos akiri finan venkon.



Drasta lukto de Li Ŝigian de la kamparana memdefenda trupo kontraŭ malamikoj







Kune kun la ĉefaj fortoj la kamparana memdefenda trupo ekstermis Vipuron kaj aliĝis al la Laborista-Kamparana Revolucia Armeo kaj marŝas al Ginggaŝ-montaro.

Rododendra Monto

La revolucia moderna pekina opero *Rododendra Monto* surscenigita en Pekino ricevis laŭdojn de la vasta spektatoraro.

La opero kun la batala vivo en la batala periodo de Ginggang-montaro, la unua kampara revolucia bazloko kreita de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ antaŭ 46 jaroj, kiel sian fonon, priskribas la kreskadon de iu kamparana spontanea armita trupo sub la gvido de la Partio. Ĝi modlas la heroan figuron de la politika laborantino de nia Partio Ke Hiang kaj prikantas la venkon de la armekonstrua linio de Prezidanto Maŭ.

Printempe de 1928, por mobilizi amasojn kaj pligrandigi siajn armitajn fortojn, la Komunista Partio de Ĉinio sendis de Ginggang-montaro gekamaradojn Ke Hiang kaj Ĝaŭ Hin al la Rododendra Monto en la Hunan-Gianghi-a limregiono, por ke ili serĉu la kamparanan memdefendan trupon komandatan de Lej Gang. Sed bedaŭrinde antaŭ atingi la lokon, ili renkontiĝis kun bienula armita trupo. En batalo kontraŭ la malamikoj Ĝaŭ Hin martiriĝis, kaj Ke Hiang estis kaptita.

Informiĝinte pri tio ege indigniĝis la soldatoj de la kamparana trupo. La trupo fondiĝis influite de la Aŭtunrikolta Leviĝo, tamen ĝi trifoje malsukcesis kaj troviĝis ĉe la rando de pereco sen gvido de la Partio. Ili deziregis "lumturon" por ilin konduki. Sekve Lej Gang kaj la kolegoj decidis sturmi la ekzekutejon por savi la komunistinon kaj ricevi gvidon de la Partio.

Sur la ekzekutejo komunistino Ke Hiang en feraj katenoj kaj blanka vesto kun sangmakuloj nerefuteble kondamnis la reakciulojn kaj propagandis al la amaso revolucian veron. Tiam soldatoj de la kamparana memdefenda trupo sub la gvido de Lej Gang fulmorapide surprizis la bienulan armitan trupon kaj savis Ke Hiang. Ili sincere subtenis Ke Hiang ke ŝi estu reprezentanto de la Partio.

Spite al mortodanĝero Lej Gang kaj la kolegoj trovis la Partion, tamen ili opiniis, ke revolucio signifas nur venĝon, ke la gvido de la Partio estas bezonata nur por ekstermi malamikojn. Tial en la unua tago post kiam Ke Hiang venis al Rododendra Monto, jam okazis kontraŭdiro inter la linio kaj politikoj de la Partio kaj la neproletaj pensoj de la memdefenda trupo.

La malnova regularo de la kamparana trupo permesis la soldatojn dividi inter si predoriĉaĵojn, kapti komercistojn kaj mortigi militkaptitojn. Ke Hiang sentis ke estas necese eduki la kamparanan trupon per la linio kaj politikoj de la Partio, alie la revolucio ne povos akiri venkon.

Sed Lej Gang, la simpla kaj brava estro de la kamparana memdefenda trupo, tiam ankoraŭ ne povis tuj kompreni la linion kaj politikojn de la Partio, kaj Ven Kigiu, filo de ruiniĝinta nobela familio, kiu enŝteliĝis en la trupon kaj uzurpis la postenon de vicestro de la trupo, kaŝe agitis intencante konfuzi la klasan fronton. Kiam Tian Dagiang, dungito de loka tirano estis kaptita, Lej Gang eĉ volis bati lin kiel lokan tiranon. Ĉu Ke Hiang, delegito de la Partio, povus toleri tian agon? Ŝi tuj deprenis de li la levitan portvekon.

Lej Gang simple eksplodis de indigno kaj riproĉis Ke Hiang, kial ŝi malpermesis onin bati kaptitan tiranon kaj liberigis kaptitan komerciston. Plena de justeco, Ke Hiang aplombe kontraŭdemandis: Ĉu ĉiuj laboruloj de la lokaj tiranoj estas tiranoj kaj devas esti punataj de revolucio? Ŝi postulis, ke soldatoj, kiuj iam laboris por tiranoj, levu la manon. Per malmultaj vortoj Ke Hiang vekis en ili amaran rememoron pri la kruelaj ekspluatado kaj subpremado de bienuloj, kaj ankaŭ Lej Gang, kiu portis palankenon por bienulo plurajn jarojn, estis forte kortuŝita.



Ke Hiang sur ekzekutejo de la malamikoj

“Kiu estas niaj malamikoj? Kiu estas niaj amikoj? Tio estas demando kun primara graveco por la revolucio.” Je tiu ŝanco Ke Hiang pluapaŝe propagandis revolucion veron. Kaj ŝi persone malligis Tian Dagiang kaj donacis al li monon kaj vestojn. Kun varmaj larmoj en la okuloj, tiu kortuŝite petis pafilon kaj decidis sekvi la Partion por revolucio. Dank’ al la eduko de la Partio, Lej Gang komencis kompreni ke en revolucio oni devas solvi la problemon de direkto kaj linio sur kiu sin apogi, kun kiu unuiĝi kaj kiun ataki.

Duonmonaton post kiam la kamparana memdefenda trupo iris en profundajn montojn por reordigi kaj trejni sin, Vipuro, kapo de la bienula armita trupo, kolektis fortojn kaj revenis al la loko. Li kaptis Panjon Du, adoptan patrinon de Lej Gang, kaj minacis ke li “bruligos ŝin”, kun la intenco allogi Lej Gang kaj liajn kolegojn por ĉiujn ilin ekstermi.

En la malfavora situacio ke fortaj estas la malamikoj dum ili malfortaj, Ke Hiang firme praktikis la instrukcion de la supera organizo de la Partio

de Gingga-montaro kaj decidis translokigi la trupon el la montoj por kune kun la ĉefa forto ekstermi la malamikojn. Ŝi travidis la venenan ruzon de Vipuro. Se la trupo eliros el la montaro, ĝi certe trafos embuskon kaj pereos. Sed Lej Gang, pro la granda indigno kontraŭ Vipuro kaj arda deziro savi Panjon Du kaj sub la instigo de Ven Kigi, kiu jam perfidis kaj transiĝis al la malamikoj, senpripense malsupreniris de la monto spite la admonon de Ke Hiang.

Kiel atendite, Lej Gang estis kaptita. Profitante tiun ŝancon, Ven Kigi ekatakis Ke Hiang. Li ludis diversajn artifikojn kun fiintenco disfali la revolucion trupon, por trompi la trupon ke ĝi malsupreniru.

En tiu kriza momento, Ke Hiang kvazaŭ giganta roko en torento defendis la militan linion de Prezidanto Maŭ. Ŝi admonis la trupanojn ke la batalantoj “en kriza momento ne lasu sablerojn blindigi la okulojn, dum danĝera tempo distingu pravon dis de eraro”, kaj samtempe ŝi malkaŝis la intrigon de Ven Kigi al la amaso. Krome, ŝi

okazigis kunvenon de partia organizo, en kiu ili analizis la ŝanĝitan situacion: se la trupestro ne estos tuj elsavita, ŝanceliĝos la tuta trupo, kaj la tasko de translokiĝo por konservi batalforton ne povos esti plenumita. Pro tio ili ellaboris planon por savi Lej Gang kaj Panjon Du.

Lej Gang renkontiĝis kun Panjo Du en karceri. Li sciigis de ŝi ke k-do Ĝaŭ Hin kiu estis mortigita de Vipuro antaŭ duonmonato estis la edzo de Ke Hiang. Tiam Lej Gang profunde konis la noblan karakteron de Ke Hiang, kiu estis grandanima kaj ĉiam metis la interesojn de la Partio sur la unuan lokon.

En tiu tempo, Vipuro rimarkis ke la kamparana memdefenda trupo translokiĝas al la limregiono, kaj samtempe la sekreta letero de Ven Kigiu konstatis tion, li do tuj sendis plejparton de sia trupo al la limregiono por bari la kamparanan trupon kaj restigis nur unu subplotonon por gardi la karceron. La sturma grupo komandata de Ke Hiang sagace atakis la karceron, elsavis Lej Gang kaj lian adoptan patrinon, venke repuŝis la persekutantajn malamikojn kaj triumfe revenis en la montojn.

Ĉirkaŭ la foriro de Ke Hiang, Ven Kigiu ĉiamaniere klopodis por demoralizi la kamparanan memdefendan trupon gvidatan de la Partio. Kiam li informiĝis ke Ke Hiang jam elsavis Lej Gang, li dronis en granda konsterniĝo, kaj antaŭ reveno de Ke Hiang, li intencis forkonduki la trupon por kapitulaci al reakcia armeo. Sed Li Ŝigian, kiu provizore plenumas la gvidon de la Partio, severe montris: "La armeon gvidas la Partio!" En unuiĝo la trupanoj atenteme gardis la pozicion.

Post reveno en la montojn, Ke Hiang, Lej Gang k.a. malkovris per homaj kaj objektaj atestoj la perfidulan vizaĝon de Ven Kigiu, kaj poste Lej Gang pafmortigis lin.

Lej Gang tutkore pentis kaj indigniĝis pro siaj sinsekvaj eraroj. Ke Hiang forviŝis la sangmakuojn de sur lia frunto kaj pacience montris al li, ke lia mallarĝa venĝemo estis la ideologia kaŭzo de liaj eraroj. "La Partio direktas la pafilon" estas revolucia vero. Tiutempe Ke Hiang ekkantis:

*Senĉese por libero luktadas la sklavaro
kaj ĉie tondre bruas tamburoj de batalo.*

Ke Hiang rakontas al la soldatoj de la kamparana memdefenda trupo pri la amara historio de sia familio.



*Sed al ilia faro mankis klara celo
kaj multaj vivoferis heroe en ribelo
kun nobla volo kaj rigardo indigna al ĉielo!
L' armitaj fortoj kamparanaj ĉiam devas
sekvi P' Kompartion
por venki kaj prosperi, kunfluante kiel bran-
ĉoj de Jangzi-rivero.*

Tio estas profunda resumo de la leciono de la historio de la armita batalo de la ĉinaj kamparanoj.

Fine, sub la komando de Ke Hiang, la kamparana memdefenda trupo, kunagante kun ĉefa trupo, profunden allogis kaj komplete ekstermis la bienulan armitan trupon de Vipuro. Poste la kamparana trupo partoprenis en la Laborista-Kamparana Revolucia Armeo, ekmarŝis al Ginggangmontaro por vidi Prezidanton Maŭ.

La revolucia moderna pekina opero *Rododendra Monto* modlis per akraj kaj komplikaj konfliktoj Ke Hiang, la heroan figuron de elstara politika laboranto de la Partio kaj samtempe Lej Gang, la heroan figuron, kiu kreskis de spontanea batalanto en konscian proletan batalanton.



Por savi Panjon Du, Lej Gang senpripense mal-supreniris de la monto kaj estis kaptita de la malamikoj. Jen li renkontiĝis kun Panjo Du en karcero.

La supera gvidantaro alsendis urĝan leteron, per kiu ĝi ordonis la kamparanan memdefendan trupon ataki Ŝizikoŭ por kunagi kun la ĉefa trupo en ekstermo de Vipuro.




**KOMPLETA FOSILIO DE
STEGODONO**

En 1973, oni trovis en tero fosilion de stegodono en Heŝuj-gubernio de Gansu-provinco. La fosilio de la skeleto estas de maljuna stegodono kun alto de 4 metroj kaj longo de 8 metroj. Ĝia eburo longas 3.3 metrojn kaj ĝia diametro je la loko duonmetron distance de la pinto estas 32 centimetroj. Tiu ĉi estas unu el la plej grandaj stegodonaj fosilioj en la mondo.

Stegodono estas tre primitiva elefanto antaŭlonge jam malaperinta. Ĝi vivis

en la posta periodo de terciaro antaŭ 3 milionoj da jaroj kaj en kvaternaro antaŭ dek mil jaroj. Ĝi estas pli granda ol la nuna elefanto kaj la eburoj pli longaj. Sur la maĉfaco de molaro troviĝas transversaj eĝoj. La stegodona fosilio trovita en Heŝuj-gubernio estas la plej kompleta el la samspecaĵoj trovitaj en la mondo. Ĝi liveris gravan scienca materialon al la ampleksa kaj preciza kono pri stegodono kaj esploro pri teoriaj problemoj. La eltrovo ankaŭ liveris gravan paleontologian pruvon al analizo de formacio de la posta periodo de terciaro kaj la komenca periodo de kvaternaro, kaj al esploro de paleogeografio kaj paleometeologio de la loko kie oni trovis la fosilion.

Survoje al la lernejo de Pan Pejde



Korbo da Karpoj

IUN posttagmezon la tria kompanio de Ĥiu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo venis al Hiaŭŝi-komunumo de Benhi-gubernio de Liaŭning-provinco por sin trejni en kampo.

Post kiam la kompanio atingis la komunumon, proviantisto komencis prepari manĝon. Kiam li venis al proksima butikoj, tie oni estis vendantaj freŝajn fiŝojn. Li pensis en si: Tre bone. Hodiaŭ la trupanoj multe laciĝis de marŝado, vespere mi regalos ilin per rizaĵo kaj stufitaj fiŝoj. Sed, kiam li trovis multe da klientoj, li ŝanĝis tiun ideon. Vidinte lin, la butikestro Ĝang aliris al li kaj komplezeme demandis:

“Ĉu vi volas fiŝojn?”

“Ne, brasikojn.”

Post foriro de la proviantisto, butikestro Ĝang pensis, ke por defendi la patrolandon, socialismon kaj la venkajn fruktojn de la popolo, la ĈPLA-anoj sin trejnas en kampo, timante nek lacon nek malfacilojn kaj transirante montojn kaj riverojn malgraŭ ventego kaj pluvego. Hodiaŭ ili venis al nia loko, ni devas bone zorgi ilin. Li konsiliĝis kun siaj kamaradoj, elektis pli ol 20 grandajn karpojn kaj alportis ilin al la kompanio per korbo.

La kuirejo de la tria kompanio sidis proksime de la vendejo. Kiam Ĝang kaj liaj kamaradoj eniris ĝin, la proviantisto tuj komprenis ilian intencon. Li pensis: Ni estas popola armeo. Ju pli la popolamasoj zorgas nin, des pli ni devas nin teni modeste kaj prudente, ni neniam devas meti niajn interesojn super tiujn de la popolo. Li diris al Ĝang: “Dankojn pro via varma zorgo al ni armeanoj, sed ni ne povas akcepti la fiŝojn. Via montregiono havas malfacilan trafikon, tial havigi al vi fiŝojn ne estas tiel facile kiel en regiono marborda kaj ebeneja. Bonvole vendu la fiŝojn al la popolanoj!” Ĝang maltrankvile diris: “Vi diligente vin preparas kontraŭ milito kaj helpas nin en portado de trinkakvo kaj purigo de korto. Kial vi ne devas aĉeti la fiŝojn?” Ili demetis la korbon da fiŝoj kaj foriris.


Vidinte tion, la proviantisto rapidis al la kompania komandejo por raporti. Post interkonsiliĝo, la partia filio de la kompanio trovis, ke la opinio de la proviantisto estas prava, kaj tuj sendis vicestron de la kompanio, la proviantiston kaj soldaton por redoni la fiŝojn kaj esprimi dankon al kamaradoj de la butikoj. Vidante tiun faron de la liberiga armeo, popolanoj diris: “La popola armeo gvidata de Prezidanto Maŭ ĉiam zorgas la interesojn de la popolo.”



Ĉio por la Kolektivo

GENG Ĉangsuo, tutlanda agrikultura labor-modelo de nia lando, loĝas en Vugong-vilaĝo de Ĵaŭjang-gubernio, Hebej-provinco. Antaŭ tridek jaroj, varme respondante la alvokon de Prezidanto Maŭ “**organiziĝu**”, li kaj aliaj tri malriĉaj kamparanaj familioj kune organizis terkulturan kooperan grupon, kiu fariĝis imitinda modelo

Geng Ĉangsuo (meze en la fronto) iras al kamplaboro kune kun komunumanoj.



por la vasta kamparanaro de nia lando en irado de la socialisma vojo.

Tridek jaroj forpasis. La terkultura koopera grupo dume evoluis unue en agrikulturan koope-rativon kaj poste en Vugong-brigadon de Vugong-popolkomunumo, kaj Geng Ĉangsuo fariĝis estro de la revolucia komitato de tiu brigado.

Sub la gvido kaj edukado de la Partio, Geng Ĉangsuo kaj la kadroj de Vugong-brigado amas socialismon kaj profunde konvinkigis, ke “**nur socialismo povas savi Ĉinion**”. Ili laboras tutkore por la revolucio, pene luktas kontraŭ malfaciloj, ĉiam restas nekorupteblaj kaj tenas sian proletan politikan kvaliton kaj ili ĝuas amon kaj subtenon de la vastaj amasoj.

PERFEKTA PURECO

Vugong-vilaĝo estis malriĉa kaj postĝinta. Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj post tridekjara penema lukto, ĝi jam fariĝis prospera nova socialisma vilaĝo.

La pli ol 240 hektaroj da sterilaj sablecaj kampoj de la tuta vilaĝo jam fariĝis fekundaj kampoj imunaj de sekegeco kaj inundo, kaj la hektara produktokvanto de greno kreskis de 750 kg. ĝis 8,250 kg.

Dum la periodo de la terkultura koopera grupo, ili havis nur simplajn agrikulturilojn, sed nun la produkta brigado jam havas du traktorojn, pli ol cent elektrajn motorojn kaj dizelojn kaj pli ol 80 draŝmaŝinojn, ventumselektilojn kaj aliajn agrikulturajn instrumentojn.

La tuta brigado havas komunan fonduson de pli ol miliono da juanoj. La kolektivo kaj komunumanoj havas kune 270 tunojn da rezervata greno kaj plimultiĝis la enspezo de la komunumanoj.

Post sia suriro de la socialisma vojo, precipe post la komenco de la movado de lernado de Daĝaj, Vugong-vilaĝo multe ŝanĝiĝis en ĉiuj flankoj. La



Geng Ĉangsuo, Li Jantian, Kiaŭ Vanhiang kaj Lu Molin (de maldekstre), la kvar malriĉaj kamparanoj, kiuj fondis la unuan terkulturan kooperan grupon en Vugong-vilaĝo en la jaro 1943.

kadroj havas pli altan politikan konscion kaj iliaj ŝparemo, penema luktado kontraŭ malfaciloj, nekoruptebleco kaj tutkora servado al la revolucio ricevis plian disvolviĝon. Kiam la tieaj komunumanoj parolis pri la kadroj, ili ĉiuj diris kontente, ke ili neniam aŭdis, ke iu el la kadroj prunteprenis kolektivitan monon aŭ senpage uzis posedaĵon de la produkta grupo.

La kadroj de Vugong-brigado kaj ĝiaj produktaj grupoj ĉiuj aktive partoprenas en kolektiva produkta laboro kaj ĉiu el ili laboras ĉiujare meznombro pli ol 270 tagojn. Ili elspezis multe da tempo por kunveni kaj akcepti vizitantojn, tamen ili akceptis tre malmulte da subvenciaj laborpontoj. Nun Geng Ĉangsuo estas vicestro de la revolucia komitato de Hebej-provinco, vicsekretario de la gubernia komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj estro de la revolucia komitato de la komunumo. Sed li ĉiam restas rigora al si mem kiel antaŭe. Foje li iris al la gubernia urbo por ĉeesti kunvenon kaj malsaniĝis en la sekvanta tago. Sed li ne volis enhospitaliĝi por kuraco. Li loĝis en ĉambro tuj apud la kunvenejo kaj petis ke oni tenu la fenestrojn de lia ĉambro kaj la apudajn fenestrojn de la kunvenejo malfermitaj por ke li povu aŭdi la paroladojn en la kunvenejo. En la diskutado de malgrandaj grupoj li aktive diris siajn opiniojn. La kunveno daŭris ok tagojn kaj li persiste ĝin ĉeestis dum la tuta tempo. Post lia reveno, oni registris al li ok labortagojn laŭ la regu-

laro. Sed li rifuzis tion dirante: “Mi malsaniĝis kaj ne povis bone plenumi mian devon dum la kunveno en la gubernia urbo; se mi restus hejme, mi same ne povus partopreni en laboro. Estas nedece registri al mi ok labortagojn.” Per tia rigora traktado de la rilato inter la kolektivo kaj individuo, Geng Ĉangsuo donis bonan ekzemplon.

Tre multaj estas la ekzemploj pri prizorgo de la kadroj de Vugong-brigado pri la kolektivaj intereso kaj ilia firma sindeteno de la kolektivaj havaĵoj. Eĉ kiam ili havis malfacilon en ekonomio, ili tre malofte prunteprenis monon de la brigado. Foje, malsaniĝis iu el la familianoj de Li Sanpian, kadro de la brigado, kaj samtempe li konstruigis por si domon. Pro tio li sentis financan malfacilon. Geng Ĉangsuo tiam diris al la aliaj kadroj: “Ni kadroj kolektu por li la bezonatan monon, por ke li ne prunteprenu monon de la brigado. Alie, se kadro donos malbonan ekzemplon en tio kaj komunumanoj ĝin imitos, la divido de rikoltaĵoj al la komunumanoj estos influita kaj tio malutilos al la firmigo de la kolektiva ekonomio.” Ĉiuj kadroj konsentis lian opinion kaj kune helpis Li Sanpian en solvo de la malfacilo.

Neniu el la kadroj de Vugong-brigado prenis eĉ unu groŝon de la brigado aŭ konsumis eksterporcian grenon de la brigado kaj neniu el ili iam prenis frukton de la kolektivaj fruktoĝandenoj.



Membroj de la partia ĝenerala filio de la brigado en studado

Kelkfoje ili kunvenis apud arakid-tenujoj de la brigado ĝis profunda nokto, tamen neniu tuŝis la arakidojn.

Komunumanoj laŭdis ilin: “Ja estas pli sekure komisiĝi la posedaĵojn al la brigadaj kadroj ol ilin enŝlosi en sian ŝrankon!” Kaj ankaŭ kadroj kaj membroj de najbaraj brigadoj laŭdis ilin: “La kadroj de Vugong-brigado estas vere puraj de korupteco!”

LABOREMO KAJ ŜPAREMO

Enirinte Vugong-vilaĝon, oni tuj rimarkas vicojn da novaj brikdomoj, el kiuj la plejparto apartenas al komunumanoj aŭ la kolektivo kaj nur tre malmultaj al kadroj de la brigado.

La pordokadro de la brigada oficejo delonge jam difektiĝis kaj nur du muroj restas apud la tre kadukaj pordklapoj. La meblaro en la domo konsistas nur el nelakitaj tablo kaj benkoj kaj iom eleganta ŝranko por aktoj, kiu estas trofeo de la agrara reformo.

Kial Vugong-brigado, jam tiel riĉa, eĉ ne konstruis por si oficejon?

La domo de la nuna brigada oficejo estis la vilaĝestra oficejo dum la Kontraŭjapana Rezistmilito. Kiam fondiĝis granda agrikultura kooperativo, kooperativanoj proponis ĝin rekonstrui, sed Geng Ĉangsuo kaj aliaj gvidantaj kadroj ne konsentis dirante: “Iom atendu, atendu ĝis nia brigado fariĝos riĉa.” Pli poste, kiam la produktado disvolviĝis kaj multiĝis la komuna fonduso,

komunumanoj denove proponis konstruon de nova domo por la oficejo. La kadroj ankoraŭ ne konsentis kaj diris: “Iom atendu kaj ni konstruu novan domon post kiam ĉiuj komunumanoj enloĝiĝos en novan domon.” Post ankoraŭ kelkaj jaroj, kiam plejparto de la komunumanoj jam enloĝiĝis en novan domon, oni denove elmetis la proponon kaj la kadroj tamen ankaŭ ne konsentis kaj diris: “Iom atendu kaj konstruu post kiam finkonstruiĝos la domo de la brigada kuracejo.”

Post prokrasto kaj prokrasto kaj fine jam konstruiĝis la domo de la kuracejo kaj eĉ nova stalo, tiam komunumanoj urĝigis: “Ĉu ankoraŭ atendu? Nun jam estas tempo por konstrui domon de la oficejo, ĉu ne?” Kadroj diris: “Kial malpacientiĝi?” “Se novan oficejon vi ne konstruos nun,” iu diris, “almenaŭ vi devas iom ripari la pordon por ke ĝi aspektu dece.” Tiam la kadroj diris: “Por la riparo ni devus elspezi multe da mono, ĉu ne estus pli bone aĉeti per la mono kemian sterkon por ke grenplantoj kresku pli bone?”

En tiu brigado, la kadroj ĉiam cedas ŝancojn de ĝuo de bonstatigaj aranĝoj al komunumanoj.

En printempo de 1966 forta tertremo okazis en Hingtaj-regiono, kaj ĉ. 90% de la domoj de Vugong-brigado ricevis fendojn en la muroj. La ŝtato disdonis monon kaj materialojn por helpi la popolanojn de la regiono. Tamen neniu el la kadroj de Vugong-brigado akceptis helpojn kaj ili unue konstruigis domojn por la amasoj. La domo de Geng Ĉangsuo estas malvasta por lia multmembra familio kaj liaj familianoj delonge jam deziris konstrui por si novan domon, sed Geng Ĉangsuo insiste rifuzis ilian postulon. Kiaŭ Liguang, vic-

sekretario de la partia ĝenerala filio de la brigado, respondecas pri aranĝo de rekonstruado de domoj de la brigado. 7-8 jarojn post lia enoficiĝo pli ol 200 el la 600 familioj de la tuta vilaĝo jam konstruis novan domon, tamen lia malnova domo fendita de tertremo ankoraŭ ne estas rekonstruita. Kiam oni admonis, ke li konstruu por si novan brikan domon, li diris: “Mi faru tion kiam neniuj komunumano bezonos tion fari.”

En majo de 1973, la partia komitato de Vugong-komunumo aranĝis por 160 kadroj de la komunumo vizitadon al la gubernia urbo Luanĉeng. La gubernio Luanĉeng pretigis manĝon por ili. Sed je la tempo por manĝo, en la manĝejo tamen ne troviĝis la vizitantoj de Vugong-brigado. Ĉar la dudek kelkaj kadroj de tiu brigado estis manĝantaj panojn kunportatajn en ombro de la kontraŭa domo. Ili ne prenas manĝosubvencion de la kolektivo kiam ili iras aliloken por laboro, se tio ne bezonas tranokti aliloke.

Geng Lianmin, kontisto de la brigado, jam havas la aĝon de pli ol 60 jaroj. Li estas nomata de la komunumanoj “ruĝa mastrumanto”. En ĉiu vintro, li kribris karbocindron por elpreni nebruligitajn karbopecetojn kaj tiamaniere ŝparis ĉiujare centojn da kilogramoj da karbo en hejtado de la forno en la brigada oficejo. Tra la manoj de la maljuna kontisto ofte speziĝas sufiĉe grandaj monsumoj, tamen li ne lasas malŝpari eĉ peceton da karbo miksitajn en cindro. Li ofte diris: “Oni devas neniam malŝpari la posedaĵojn de la kolektivo, ĉar ili estas perlaboritaj de la komunumanoj.”

Edifite de Geng Ĉangsuo, la kadroj kaj komunumanoj de Vugong-komunumo estas kaj laboremaj kaj ŝparemaj kaj ili ofte montras per konkretaj agoj sian komunisman spiriton de amo al la ŝtato kaj la kolektivo. En 1963, tie okazis inundo, la grenplantoj estis inunditaj kaj iuj domoj estis detruitaj de furioza torento. La supera instanco intencis helpi Vugong-brigadon per kvanto da materialoj, sed Geng Ĉangsuo diris: “Helpu unue la komunumanojn de aliaj lokoj, ĉar ni mem povas solvi niajn malfacilojn.” Ili uzis parton de la kolektiva rezervita greno por kontentigi la vivbezonojn de la komunumanoj kaj samtempe aktive direktis la komunumanojn en restarigo de produktado. Ili ne nur venkis siajn malfacilojn, sed ankaŭ liveris 60 tunojn da fojno kaj 100 tunojn da legomoj por helpi serioze plagitan regionon.

De multaj jaroj, ĉiujfoje kiam grenrikoltaĵoj estis alportitaj al la draŝejo, Vugong-brigado senescepte asignis siajn lertajn kamparanojn al la draŝejo

por zorge draŝi, ventumi kaj elekti plej bonan grenon por liveri ĝin al la ŝtato. En 1972, tie okazis sekegeco kaj iuj el la najbaraj brigadoj ne povis plenumi sian taskon de liverado de greno al la ŝtato. Sed Vugong-brigado meminitate vendis al la ŝtato 400 tunojn da superbezona greno post plenumo de sia tasko.

NOVA MORO

En la stala korto de la tria produkta grupo de Vugong-brigado troviĝas kelkaj jujubarboj, kies fruktojn oni povas facile atingi per levita mano. Ĉiutage oni ne scias kiom multe da homoj trairas sub ili, sed neniuj lasis sin depreni jujubon. La jujuboj estas rikoltitaj nur je la Aŭtunmeza Festo kaj dividitaj al ĉiuj familioj.

Rikoltado de kotono



La bona stilo de amo al la kolektivo kaj konsciencia protekto de la kolektivaj interesoj de la komunumanoj de Vugong-brigado estas formita sub la influo de la kadroj, kiuj peneme luktas kontraŭ malfaciloj, ĉiam sindoneme servas al la kolektivo, donas bonan ekzemplon al la amasoj en konduto kaj estas rigoraj al si mem.

En Vugong-vilaĝo okazis jeno: En iu somero Geng Ĉangsuo preterpasis la melon-ĝardenon de la unua produkta grupo kaj Malgranda Li, junulo gardanta la melonojn tie, diris al alia gardanto Maljuna Li: “Ni regalumu Maljunan Geng per melono.” Maljuna Li, kiu konas la kutimon de Geng Ĉangsuo, diris: “Tion ne faru, ĉar li certe ne akceptos.” Malgranda Li diris: “Mi nepre manĝigos lin.” Kiam Geng Ĉangsuo alproksimiĝis, Malgranda Li deprenis melonon kaj ĝin donis al li dirante: “Gustumu melonon. Jen fama ‘Plaĉa al Maljunuloj’.” “‘Plaĉa al Maljunuloj?’”

diris Geng Ĉangsuo ridetante. “Jes, bona speco. Tamen ĉu ĉiu alveninta komunumano povas ĝuitian plaĉaĵon?” “Tio ne eblas,” diris Malgranda Li, “ĉar multegon oni povus forkonsumi.” Geng Ĉangsuo diris: “Se aliaj ne povas, ĉu mi tamen povus? Ĉu mi estas super la aliaj?” Tion dirante li redonis la melonon al Malgranda Li.

Tiu rakonto vaste cirkulis inter la komunumanoj kaj ankaŭ ili protektas la kolektivajn interesojn imitante la ekzemplon de la kadroj. Ekzemple, dum kolektado de la postlasitaj arakidoj, neniu komunumano manĝis trovitajn arakidojn. Ili diris ke la arakidoj apartenas al la kolektivo, kaj ĉiu el ili devas esti donitaj al la kolektivo.

Por la membroj de Vugong-brigado, estas hontinde atenci komunan intereson por la bono de individuo kaj estas glorie labori sinforgese por la kolektivo. Tiu nova moro estas ĉie videbla.

Senripoza Emerito

de HE HJU

EN la fruktoĝardenoj en Suning-gubernio de Hebej-provinco viciĝas prosperaj pirarboj kun densaj floroj. Tio aŭguras riĉan rikolton. Kiam la komunumanoj parolis pri la pirarboj, ĉiuj laŭdis unuvoĉe komuniston Ju Ĵujĉang, kiu pene helpis ilin posedi teknikojn de scienca kulturado de pirarboj kaj rejunigi velkantajn arbojn. Dank’ al tio oni akiris ĉiujare riĉajn rikoltojn.

Ju Ĵujĉang partoprenis en la revolucio dum la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj aliĝis al la Kompartio jam pli ol 30 jarojn. Multjara diligenta laborado malbonigis lian sanstaton. En somero de 1965 supera organo eksigis lin je la ofico de vicdirektoro de la gubernia manĝaĵa kompanio por ke li povu ricevi pli bonan kuracon kaj ripozon. Ju Ĵujĉang tre dankis la partian organizon pro la zorgemo, sed li esperis daŭre servi laŭeble al la

popolo. Li multfoje petis ke oni asignu al li ajnan laboron kion li povas fari, tial la supera organo asig-nis al li la aĉetadon de piroj.

Laŭ kutimo, por aĉetado de piroj jam sufiĉas tio, ke oni nur zorgas pri subskribado de kontraktoj, fakturoj k.s. Tia laboro vere estis tre konvena al lia sano. Komence Ju Ĵujĉang tiamaniere faris la laboron. Sed li iom post iom rimarkis problemojn: Kial la produktokvanto de piroj de Suning-gubernio estis malpli multa ol tiu de frataj gubernioj? Kial piroj de la gubernio estis malpli bonaj ol tiuj de la frataj gubernioj? Por trovi la kaŭzon li vizitis produktajn brigadojn de 6 komunumanoj de la gubernio por enketado. Fine li trovis, ke multaj pirarboj kadukiĝis kun senordaj branĉoj kaj estis senbride atakataj de finsektoj. Kvankam la komunumanoj ŝprucigis insekticidojn kaj stucis

la arbojn, tamen ilia klopodo ne ricevis bonan efikon pro nekonado de la viva kutimo de fiinsektoj kaj neposedo de la tekniko de flegado pri la arboj.

La problemoj pezis kiel ŝtono sur la koro de Ju Ĵujĉang. Post ripetada studo de koncerna instruado de Prezidanto Maŭ “**disvolvi la ekonomion kaj garantii provizadon**”, li decidis solvi tiujn problemojn. Li volis laŭeble helpi la komunumanojn pli bone flegi la arbojn por multigi produktokvanton, plibonigi pirojn kaj pliigi la enspezon al la kolektivo kaj komunumanoj. Malgraŭ sia malforta sano li iris en vilaĝojn kaj tie konsultis fruktoĝardenistojn. Cetere li iris al aliaj gubernioj por lerni teknikojn de flegado de pirarboj kaj aĉetis multajn koncernajn librojn por konsulti ilin.

Post akiro de fundamentaj scioj en kulturado de pirarboj, Ju Ĵujĉang petis la superan organon ke ĝi sendu lin en brigadon, kie oni ĉefe okupiĝas pri kulturado de pirarboj, por persone fari eksperimentojn kaj helpi la komunumanojn en flegado de pirarboj. Pro lia insista peto la gvidantoj konsentis lian postulon. Sub helpo de la supera organo li kaj fruktoĝardenisto Li Ginĝoŭ invitita el najbara gubernio venis al Dacaŭcun-brigado kiu kulturadas plej multajn pirarbojn en la gubernio. La brigado atribuis al ili 60 maljunajn pirarbojn kiuj multjare ne donis fruktojn, por ke ili faru eksperimenton al ili.

En vintra komenco ventis froste. Ju Ĵujĉang kaj Li Ginĝoŭ diligente laboradis en la ĝardeno. Per kelkaj tagoj ili stucis ĉiujn arbojn. Iuj komunumanoj ne komprenis kaj dubis: “Vi stucis la branĉojn, kie sidu la piroj?” Ju Ĵujĉang konigis al la amasoj sciencajn flegadon de pirarboj kaj samtempe daŭrigis la eksperimenton.

Vintron sekvas printempo. La novaj branĉoj de la stucitaj pirarboj estis riĉe ornamitaj per blankaj floroj. La Komunumanoj kore ĝojis ke la velkantaj pirarboj reviviĝis. Ju Ĵujĉang kaj la komunumanoj zorgeme flegis la arbojn kaj ŝprucigis insekticidojn. En aŭtuno la 60 arboj donis 10,000 kg. da bonkvalitaj piroj. La informo pri tiu afero flugis tra la tuta gubernio kaj multaj ĉirkaŭaj vilaĝoj sendis komunumanojn por lerni de ili. Post nelonge ilia sperto estis disvastigata tra la tuta gubernio.

Sed novaj problemoj aperis post la unuaj atingoj de la scienca eksperimentado. Foje Ju Ĵujĉang kontrolis en iu brigado pirarbojn kaj trovis, ke la stucitaj arboj portas fortikajn branĉojn kaj densan foliaron, sed multaj junaj piroj sur ili sensukiĝis kaj nigriĝis. Kie estis la kaŭzo? Li atente pri-



Ju Ĵujĉang instruas teknikon pri stucado de pirarbo al komunumanoj de Ĝajnan-brigado

rigardis iun branĉon kaj vidis, ke ĉiu piro sur la branĉo havas bortruon de insektoj. Tio forte maltrankviligis Ju Ĵujĉang. Li komencis studi kiel ekstermi fiinsektojn. Li demandis maljunajn kamparanojn, kiaj insektoj detruas pirarbojn, kiuj el ili kaŭzas plej seriozan malutilon kaj kiel oni povas ekstermi ilin. La respondoj estis relative abstraktaj. Li konsultis koncernajn librojn kaj faris komparon inter la fenomenoj priparolitaj en la libroj kaj la efektiva stato. Sed pro la diferencoj de lokoj kaj klimatoj la fenomenoj de li viditaj estis ne tute samaj al tiuj eksplikitaj en la libroj. Li decidis fari penan esploron por koni la kutimon kaj vivon de la fiinsektoj.

Foje, por klare koni ovodemetan tempon de iuspecaj fiinsektoj de pirarboj kaj ovodemetan kapablon de ĉiu insekto, li observadis 6 sinsekvajn tagnoktojn. Iuj fiinsektoj aktivis en tagiĝo, kaj li observadis sub frumatenaj steloj. Iuj insektoj detruas en vespero kaj nokto, kaj li observadis en la ĝardeno kun kontraŭventa lanterno en la mano. Kun tia absorbiteco Ju Ĵujĉang faris multajn notojn en kelkaj jaroj. La notaĵoj registris detale la vivon kaj aktivadojn de la fiinsektoj kaj diversajn metodojn por ilin forigi. Krome li faris specimenojn de multaj fiinsektoj kaj fundamente konis la vivon de la fiinsektoj kaj ilian malutilon kaj akiris pozitivecon en ekstermo kaj prevento de fiinsektoj.

6 jaroj forpasis. La nuna produktokvanto de piroj de Suning-gubernio multiĝis 2.6-oble kompare kun tiu de 1967, kaj ankaŭ la kvalito multe pliboniĝis. Per la enspezoj de piroj multaj produktaj grupoj fosis maŝinputojn, instalas elektrofadenojn kaj aĉetis agrikulturajn maŝinojn, kio multe akcelis la disvolvon de agrikulturado.

Ili Fariĝis Mastroj de Brokarto

VIZITANTOJ al Hangĝoŭ tre volentas iri al la Hangĝoŭ-a Brokata Fabriko por rigardi buntajn teksaĵojn faritajn de la laboristoj.

La fabriko havas pli ol 1,700 laboristojn, el kiuj preskaŭ duono estas laboristinoj. Ili laboras en ĉiu produkta procedo same kiel viroj kaj ĉiu produktaĵo enhavas ilian saĝon kaj penon. Tio estas fiero por la laboristinoj, precipe la maljunaj.

Kial? Ĉar en la malnova Ĉinio la socia pozicio de laboristinoj estis tre malalta. Ili estis pli

malestimataj en la fabrikoj de silkaĵoj, kiuj postulas relative altan teknikon. Kapitalistoj malpermesis al ili manipuli maŝinojn kaj lerni gravan teknikon kaj asignis al ili simplan kaj pezan laboron, pretekste ke virinoj estas denaske malsaĝaj. Estis tabuite al ili labori en la Jacquard-teksila laborejo, ĉar oni diris, ke la maŝinoj nomataj kiel “kapo de drako” simbolas bonon, kaj se virinoj manipulus ĝin, la produkto certe malprogresus.

Post la Liberiĝo, sekve de renversiĝo de la re-akciaj ekspluatataj klasoj, ĉiuj malnovaj reguloj kaj

Ekzamenado de la produktaĵo





Kamaradino Ĉen Ŝanlian (meze), kiu antaŭe estis infan-laboristino, nun laboras kiel vicestro de la revolucia komitato de la Hangŝoŭ-a Brokata Fabriko, aŭskultas opiniojn de laboristinoj.

rutinoj estis forbalaitaj. Sub la edukado de la Komunista Partio tiuj politike kaj ekonomie liberigitaj laboristinoj altigis sian devkonscion kaj decidis liberigi sin ankaŭ en la tekniko. Multaj laboristinoj tre penis en lernado de tekniko sub la helpo de veteranaj laboristoj, posedis fundamentan teknikon en mallonga tempo kaj aplikis ĝin en produkto.

La unua procedo por produkti brokatojn inkluzivas jenajn: projekti desegnojn kaj efektivi ilin en teksado. Efektivigi desegnojn en teksado estas la ĉefa tekniko, kiu multe influas la artan efikon de la teksaĵoj. Antaŭe laboristinoj malestimataj kaj subpremataj de kapitalistoj ne havis eblecon por okupiĝi pri tiuj laboroj. Post la Liberiĝo dank' al la zorgo de la Partio, aro da teknikistinoj estis elkulturitaj. Kiam laboristinoj lernis pentradon kaj efektivigon de desegnoj en teksado, la fabriko aparte komisiis veteranajn laboristojn por ke ili donu teknikajn lecionojn, sendis laboristinojn al aliaj lokoj por viziti famajn pejzaĝojn, historiajn vidindejojn kaj ekspoziciojn de metiartaĵoj por riĉigi iliajn sciojn.

Ĝang Juandi antaŭe estis kolorigistino, sed poste ŝi lernis efektivi desegnojn en teksado. Kun instruiteco de elementa lernejo, ŝi devis venki multajn malfacilaĵojn kaj cetere ŝi sciis nek belarton nek la tutan produktan procedaron. Tamen ŝi havis plenan entuziasmon en lernado. Por akiri la fundamentajn sciojn kaj teknikon pri traktado de stereografia efiko, heleco, tuĉado kaj projekcio, ŝi ofte ekzercis sin per pentrado de morta naturo kaj

krokizo de pejzaĝoj, konsultis libron pri teknologio de silkaĵoj kaj profundigis en laborejojn por koni la produkton. Per malpli ol du jaroj ŝi jam povis memstare labori.

Dum la lastaj 20 jaroj, dank' al senlaca klopodado la projekta laboro multe progresis kaj la teksaĵoj impresas per stereografia efiko kaj vivecaj homfiguroj.

La laboristoj de teks-laborejo devas posedi altan teknikon. Tie laboristinoj nun manipulas ne nur simplan teksilon sed ankaŭ komplikan teksilon por teksu kolorajn brokatojn. Per siaj manoj kaj saĝo ili teksis kolorriĉajn kaj delikatajn brokatojn, tablotukojn, kusenajn ŝtofojn kaj aliajn.

Laboristino He Gjuhian eklernis manipulado de teksmaŝino en la jaro 1959. Laŭ la ĝenerala kutimo ĉiu novico devas lerni tri jarojn. Sed per lernado kaj laborado samtempaj de kelkaj monatoj ŝi jam povis manipuli memstare. En la komenco ŝi jam povis manipuli du Jacquard-teksilojn. Ŝi serioze studis la teknikon en sia produkta praktiko kaj iom post iom formis sian propran metodon de manipulado, per kiu ŝi povas manipuli samtempe 5-6 Jacquard-teksilojn kaj plenumi produktan planon laŭ la difinitaj normoj de kvalito kaj kvanto. Krome ŝi ofte helpas novajn kolegojn plibonigi manipulado por atingi bonajn sukcesojn. Ŝi plurfoje estis elektita kiel avangardulino de la tuta fabriko. Inter la avangarduloj de tiu laborejo troviĝas fame

konata tutlanda Ruĝa Standardisto de la Oka de Marto.

La laboristinoj ellernis la brokarton, kaj nemalmultaj el ili fariĝis gvidantoj de diversaj niveloj. Ni prenu ekzemple vicestrinon de la revolucia komitato de la fabriko Ĉen Ŝanlian. Ekde la aĝo de naŭ jaroj ŝi laboris en silka teksejo kaj kokon-elbobenejo de kapitalistoj. Iufoje ŝi ne povis tuj meti siajn manojn en tro varman akvon por elbobenado, tiam proto enigis ŝiajn manojn en la varman akvon, tio tuj estigis sur ŝiaj manoj multajn sangvezikojn. La suferplenaj tagoj kaŭzis al ŝi malsanojn. Post la Liberiĝo la fabriko sendis ŝin al Ŝanhajo por kuraco kaj tie ŝi resaniĝis. Ekde tiam ŝi kun plena revolucia entuziasmo ĵetis sin en laboron kaj samtempe persistis klerigi sin en postlabora lernejo. En la jaro 1951 ŝi estis elektita de la laboristinoj kiel membro por virinaj aferoj en la komitato de la laborsindikato de la fabriko; en 1953 ŝi glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio; en 1957 ŝi estis promociita al vicestro de la fabriko; en la granda kultura revolucio ŝi kune kun la laboristaj amasoj firme defendis kaj plenumis la proletan

revolucian linion de Prezidanto Maŭ, kaj estis elektita kiel membro de la partia komitato kaj vicestro de la revolucia komitato de la fabriko.

La nombro de la kadrinoj en fabriko kaj laboreja niveloj okupas 26 % de la kadroj de la tuta fabriko. Pli multaj laboristinoj estas nomitaj kiel grupestrinoj. Ili ĉiam donas belan ekzemplon en revolucio kaj produkto kaj marŝas antaŭen kune kun la laboristoj.

Post la Liberiĝo la Hangĝoŭ-a Brokata Fabriko havis senĉesan disvolvon en produktokvanto, kvalito kaj specoj de produktaĵoj. En la pasinteco ĝi povis produkti 4 specojn de tablotuko kaj kusena ŝtofo, kaj la pejzaĝaj desegnoj sur silkaĵoj limiĝis je la vidindaĵoj de la Okcidenta Lago kaj antikvaj konstruaĵoj en Pekino en nigra kaj blanka koloroj. De multaj jaroj la projektantoj vaste kolektis opiniojn kaj postulojn de klientoj kaj faris novajn projektojn; ankaŭ la laboristoj senĉese plibonigis la ekipaĵojn kaj altigis la produktan povon. Nun la koloraj teksaĵoj surhavas niajn revoluciajn sanktejojn, famajn montojn kaj riverojn, pentraĵojn de famaj antikvaj kaj modernaj pentristoj, grandajn homfigurojn kaj aliajn.



Emerita laboristino Li Menggjuan kun sia nepo



Inter Amikoj

Sinjoro Masuda Vataru

— Amiko de Lusin

TRE kviete estis en la korto de la malnova loĝejo de Lusin en Pekino kun smeraldaj arboj. Iun posttagmezon de oktobro, 1973, iu japana amiko kun aĝo de pli ol 70 jaroj venis tien kaj atente pririgardis la loĝejon, kie S-ro Lusin iam laboris kaj loĝis. Li estas S-ro Masuda Vataru, membro de la Delegacio de la Asocio de la Kultura Interŝanĝo inter Japanio kaj Ĉinio, profesoro de la japana Kansai-Universitato kaj tradukisto de verkoj de Lusin.

S-ro Masuda Vataru estas malnova amiko de Lusin antaŭ lia forpaso. Printempe de 1931 li venis al Ŝanhajo de nia lando kaj konatiĝis kun S-ro Lusin dank' al prezentado de la japana amiko S-ro Uĉijama Kanzo, kiu loĝis ankaŭ en Ŝanhajo. Tiam S-ro Masuda Vataru pretis traduki la verkon de S-ro Lusin *Historia Skizo pri Ĉinaj Noveloj kaj Romanoj*. Por solvi demandojn en la tradukado li konsultis S-ron Lusin kaj ili ofte intime interparolis korverse. En 1936, kiam Lusin serioze malsaniĝis, S-ro Masuda Vataru speciale venis al Ŝanhajo por lin vidi. Per rekta kontaktado kaj korespondado li kaj Lusin starigis inter si profundan amikecon. Ĉifoje, apenaŭ li atingis Pekinon, li petis permeson por viziti la malnovan loĝejon de Lusin.

Enpaŝinte en la malnovan loĝejon de Lusin, S-ro Masuda Vataru dronis en multaj rememoroj pri la amikeco antaŭ pli ol 40 jaroj. Tiam Ĝoŭ Hajjing, filo de Lusin, estis ankoraŭ malgranda knabo. Nun li varme bonvenigis la malnovan amikon de sia patro ĉe la pordo de la loĝejo. Ĝoŭ Hajjing derompis branĉon de *ĉingjau-o** kun ruĝaj fiuktoj kaj verdaj folioj en la korto kaj donacis ĝin al S-ro Masuda Vataru. Ili ankaŭ kune fotografis sin por memoro.

Sur la muro de la dormĉambro de S-ro Lusin pendas foto de S-ro Fuĝino, instruisto de Lusin dum lia lernado en Japanio. La foto altiris atenton de S-ro Masuda Vataru. Li kun profunda sento

diris: “Mi eksciis la amikecon inter S-ro Lusin kaj S-ro Fuĝino ĝuste el la artikolo *Sinjoro Fuĝino* verkita de S-ro Lusin. Kiam mi legis la paragrafon: ‘Kiam mi laciĝis dum la nokto kaj volis ĉesigi laboron, mi ekvidis je kapolevo lian vizaĝon sunbrunan kaj malgrasan en lamplumo, . . . mi do ekbruligis cigaredon kaj daŭrigis verkon abomenindan por la “ĝentilaj sinjoroj”’, la figuro de Lusin, kiel obstina batalanto, reaperis antaŭ miaj okuloj.” Li diris, ke lia persona vizito al la loĝejo de Lusin kaj respertado de la malnova amikeco postlasis al li neforgeseblan impreson.

Dum la periodo de 1931 ĝis 1936 S-ro Lusin ĉiam korespondis kun S-ro Masuda Vataru, respondis al li diversajn demandojn kaj skribis al li pri la batalo en la kulturaj rondoj de Ĉinio. Kelkajn tagojn antaŭ sia forpaso S-ro Lusin ankoraŭ skribis leteron al S-ro Masuda Vataru. La leteron Masuda Vataru ricevis du tagojn post kiam li informiĝis pri la forpaso de Lusin el radiodissendo. En pli ol 40 jaroj S-ro Masuda Vataru konservis preskaŭ 60 leterojn skribitajn de Lusin al li kiel karajn memoraĵojn. Ĉiufoje, kiam ĉinaj amikoj gastis en lia hejmo, li ĉiam entuziasme montris tiujn leterojn al ili kaj senĝene parolis pri la amikeco inter la japana kaj ĉina popoloj. En aŭgusto de la pasinta jaro, kiam la Eldona kaj Presa Delegacio de nia lando vizitis Osaka-n de Japanio, li refoje portis tiujn karajn leterojn al la hotelo de la ĉina delegacio kaj montris ilin al la ĉinaj amikoj. Kiam li informiĝis, ke Gaŭ Ljufang, respondeculo de la Eldonejo de Ĉinaj Historiaj Restaĵoj, intencis ordigi kaj eldoni tiujn leterojn post la reveno al Ĉinio, li speciale elektis el ili dek leterojn kaj faris kolorajn fotojn pri ili, kiujn li donacis al Gaŭ Ljufang. La lasta donacis al li du ekzemplerojn de *Elektitaj Manuskriptoj de Lusin* broŝuritaĵojn laŭ ĉina maniero. Sinjoro Masuda Vataru tre ĝojis pro la plia disvolviĝo de la amika kontakto kaj kultura interŝanĝo de la japana kaj ĉina popoloj.



Ĝoŭ Gianĵen (maldekstre) varme manpremas kun Sinjoro Masuda Vataru.

Dum restado de S-ro Masuda Vataru en Pekino, Ĝoŭ Gianĵen**, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso aranĝis festenon por li. En 1931, ĝuste kiam S-ro Masuda Vataru lernis en Ŝanhajo, Ĝoŭ Gianĵen laboris tie. Vespere de sabato Ĝoŭ Gianĵen ofte iris al hejmo de Lusin kaj tie li multfoje renkontis S-ron Masuda Vataru. Ili kune vespermanĝis kaj amike interparolis kvazaŭ samfamilianoj. Kiam ili renkontis unu la alian en Pekino post disiĝo de 42 jaroj, ili sentis apartan intimecon. Rememorante la sincerajn helpojn kaj instruojn donitajn de S-ro Lusin al li S-ro Masuda Vataru diris, ke S-ro Lusin rigardis lin kiel parencon kaj amikon, kaj ankaŭ li tre estimis lin kaj rigardis lin kiel bonan instruiston kaj

amikon. En la festeno S-ro Masuda Vataru donacis al Ĝoŭ Gianĵen la libron *Impreso pri Lusin* verkitan de li por memoro.

Antaŭ la forlaso de Pekino, S-ro Masuda Vataru ĝoje diris al la ĉinaj amikoj, ke kvankam mallonga estas lia vizitado al Ĉinio, tamen grandaj estas liaj rikoltaĵoj. Li diris, ke li kolektis materialojn por skribi artikolojn pri Ĉinio por la japana popolo post sia hejmenreveno. Li varme prezentis, kiel la diversrondaj personoj de Japanio lernas kaj studas verkojn de Lusin. Li diris, ke S-ro Lusin estas jam delonge konata de la japana popolo. Precipe post la fondiĝo de la nova Ĉinio pli kaj pli multiĝis homoj, kiuj legas kaj studas verkojn de Lusin kaj inter tiuj multaj estas junuloj. Li mem ofte ricevis leterojn kaj revuojn de diverslokaj organizoj studentaj pri Lusin kun peto pri lia helpo por solvi malfacilajn demandojn. Nun iuj japanaj lernejoj prenas verkojn de Lusin kiel instrumaterialon kaj ĉiam plimultiĝas la eldona kvanto de la *Elektitaj Verkoj de Lusin* kaj liaj aliaj verkoj en la japana traduko.

S-ro Masuda Vataru ĝoje diris ankaŭ, ke post la efektiviĝo de normaligo de la diplomaciaj rilatoj inter Japanio kaj Ĉinio pli kaj pli multiĝis kontaktoj de diversaj flankoj inter la japana kaj ĉina popoloj. Li deziras, ke la amikeco inter la japana kaj ĉina popoloj pli kaj pli fortiĝos kaj daŭros de generacio al generacio.

**ĉinĝajŭ-o (Zanthoxylum piperitum) estas planto kies fruktoj estas uzataj kiel spico kaj en farmaciado.*

***Ĝoŭ Gianĵen estas plijuna frato de S-ro Lusin.*



Ekonomio de la Kapitalisma Mondo en Malfacila Situacio

EN 1973, forte skuiĝis la ekonomio de la kapitalisma mondo. La sinsekve leviĝintaj financaj krizoj, la nebremsebla inflacio kaj manko de petrolo kaŭzita de la kvara mezorienta milito, senĉese kaj draste atakis la malfortan kapitalisman ekonomion kaj dronigis la okcidentan mondon en grandan ĥaoson.

NEFORSKUEBLA MONA KRIZO

Komence de 1973 fortega skuiĝo sur la internacia financa merkato pli kaj pli profundigis la krizon de la usona dolaro. Sub la serioza frapo de ŝtormo de la mona spekulacio kaj konkura aĉeto de oro la usona registaro devis duafoje deklari je la 12-a de februaro, 1973, devaluton de la usona dolaro en 14 monatoj post ĝia unua devaluto. Tamen la refoja devaluto ankoraŭ ne povis kvietigi la malordigitan fincan merkaton. Sub pli forta atako

de mona spekulacio la ĉefaj okcidentaj kapitalismaj landoj devis dufoje fermi la monŝanĝan merkaton en dudek tagoj kaj poste estis devigita rompi la fiksan kurzon de la usona dolaro en rilato kun sia propra mono kaj praktiki kunan aŭ unuopan variadon de kurzo. Tiamaniere bankrotis la internacia kapitalisma mona sistemo starigita post la Dua Mondmilito kun la usona dolaro kiel sia akso, laŭ kiu la diverslandaj monoj tenadis sian fiksan kurzon kun la usona dolaro.

Post bankroto de la fiksa kurzo, la kurzo de monoj de la kapitalismaj landoj ankoraŭ pli forte variis kaj la mona kaj financa merkato de la Okcidento daŭre restis malstabila.

Post la dua devaluto de la usona dolaro, oni povas interŝanĝi unu uncon da oro kontraŭ 42.22 usonaj dolaroj anstataŭ 38 laŭ la oficiala kurzo de Usono. Tamen en la meza tagdeko de majo la prezo

Pro la energia krizo, la nederlanda registaro malpermesas aŭtoveturadon en dimanĉo. Jen en tiu tago junuloj de Amsterdamo, la ĉefurbo de Nederlando, tiras aŭton sur strato por protesti kontraŭ la registaro.



de unu unco da oro sur la okcidenta libera merkato jam superis 100 dolarojn kaj en junio kaj julio ĝi leviĝis ĝis preskaŭ 130 dolaroj.

Dum grandskala falo de la valoro de la usona dolaro, ankaŭ la sterlinga pundo kaj la itala liro sintrovas en malfacila situacio. En la komenco de marto de 1973, kiam la krizo de la usona dolaro estis en seriozeco, la naŭ landoj de la Okcidenteŭropa Komuna Merkato decidis kunan variadon de la kurzoj de siaj monoj, tamen la sterlinga pundo kaj itala liro ne povis partopreni en ĝi pro sia malforteco kaj devis unuope variadi. Poste la du monoj ĉiam sin trovis en danĝera situacio.

Antaŭ nelonge la okcidenteŭropaj landoj alfrontis malhelan perspektivon de ekonomio pro manko de petrolo. En Londono, Zuriko kaj aliaj lokoj aperis tajdo de konkura aĉeto de oro. Krom grandskala falo de la kurzoj de la sterlinga pundo kaj de la nederlanda guldeno, ankaŭ al la okcidentgermana marko kaj japana jeno falis en malstabilecon.

Por solvi la monan krizon kaj restarigi la monan kaj financon sistemon de la kapitalisma mondo, la okcidentaj landoj okazigis konferencon en Nairobi de Kenjo en la pasinta junio por interkonsiliĝi pri tio. Tamen la konferenco fermiĝis tute sen rezulto pro profundaj konfliktoj de interesoj inter tiuj landoj.

PLI KAJ PLI AKRIĜAS INFLACIO

Por mildigi la ekonomian krizon, la ĉefaj kapitalismaj landoj ĝenerale praktikis deficitan budĝeton, multigis elspezojn de la registaro, plivastigis krediton kaj kreis ŝajnan prosperon de t.n. "kresko de ekonomio". Sekve de tio aperis nekontrolebla inflacio tra la tuta kapitalisma mondo. La disvolviĝo de la inflacio pluapasa akriĝis la monan krizon.


Laŭ raporto de la "Organizo por Ekonomia Kooperado kaj Disvolvado" de la Okcidento, en la pasintaj 12 monatoj ĝis la fino de oktobro la inflacia kresko atingis 14.4% en Japanio, 9.9% en Britio, 8.1% en Francio, 7.9% en Usono kaj 6.6% en Okcidenta Germanio. La rapideco kaj la skalo de inflacio de tiuj landoj estis maloftaj en la pli ol 20 jaroj post la Dua Mondmilito.

Inflacio rekte kaŭzis drastan leviĝon de varprezoj, malbone influis la vivon de la popolo, malaltigis ĝian aĉetpovon, akriĝis la konflikton inter la produktado kaj merkato kaj tiel kreis kondiĉojn por estonta ekonomia krizo.

Por haltigi inflacion, Usono, Britio, Francio, Italio, Nederlando, kaj a. sinsekve alprenis, ekde la jaro 1972, diversgrade aŭ ŝtupe urĝajn paŝojn, kiel ekzemple blokado de la salajroj, varprezoj, lupago kaj interezo. Samtempe multaj kapitalismaj landoj konkure kaj grandskale altigis la bankan interezon por kontroli kreditajn pruntojn kaj ŝrumpigi la cirkulan monkvanton. Iuj landoj, kiel ekzemple Britio kaj Italio, per tiuj aranĝoj kontrolis la elfluon de mallongperioda kapitalo por protekti la pozicion de la propra mono. Nun la centraj bankoj de la okcidenteŭropaj landoj iom post iom levis siajn interezojn preskaŭ ĝis la rekorda alteco en la historio. Ekzemple, la banka interezo atingis 13% en Britio, 11% en Francio, 9% en Japanio kaj 7% en Okcidenta Germanio. La Federacia Rezerva Banko de Usono dekkelkfoje altigis sian diskontan procentaĵon de 4% al 7.5% dum la periodo de januaro ĝis meza aŭgusto de 1973.

Konkura altiĝo de la banka interezo de la ĉefaj kapitalismaj landoj unuflanke kaŭzis teruran altiĝon de la interezo de konsumaj kaj mallongperiodaj pruntoj koncernantaj la popolan vivon, multe pezigis la ŝarĝon de la popolo kaj sekve malgrandigis la postulojn de la merkato; aliflanke ĝi neeviteble kaŭzis altiĝon de la produktaj kostoj kaj reduktion de la fiksa investo de entreprenoj, kaj tiel kreskigis senlaborecon kaj akute malbonigis la ekonomion.

Je la 10-a de januaro, 1974, lokomotivistoj de Londono okazigis strikon. Jen fervoja stacio en strikado.



Sub la reciproka influo de la mona krizo kaj inflacio en la pasinta jaro la okcidentaj ekonomiaj rondoj asertis, ke en 1974 finiĝos la ŝajna prospero de ĉiuj ĉefaj kapitalismaj landoj kaj venos nova ekonomia krizo.

PROFUNDA INFLUO DE MANKO DE PETROLO

Post la kvara mezorienta milito la arabaj landoj kaj iuj aliaj oleproduktaj landoj decidis redukti la produktadon de petrolo, altigi la petrolan prezon kaj ĉesigi eksporton de petrolo al tiuj landoj, kiuj subtenas Izraelon. Tiuj aranĝoj forte skuis la okcidentan ekonomion kaj dronigis ĝin en grandegan haoson.

La petrolo produktita de la meza Oriento kaj norda Afriko okupas 41% de la totala produktokvanto de petrolo de la mondo, el kiu pli ol 90% estas eksportita al okcidenta Eŭropo, Japanio, Usono k. a. En 1972, pli ol 80% de la importita petrolo de okcidenta Eŭropo kaj Japanio kaj 33% de tiu de Usono estis liverita de la meza Oriento kaj norda Afriko. La redukto de petrola provizo povas kaŭzi paraliziĝon de ekonomio, tial ĝi vekis ĝeneralan konsterniĝon en la Okcidento.

Tiu konsterniĝo montriĝis unue en tio, ke en la ĉefaj kapitalismaj landoj aperis fenomeno de akuta prezofalo de akcioj. Tio spegulis la maltrankviliĝon de kapitalistoj pri la ekonomia perspektivo. En la 19-a de novembro de la pasinta jaro okazis al la prezindico de la 30 specoj de industriaj akcioj difinitaj de Daw Jones la plej granda falo dum la pasintaj 11 jaroj, inter ili plej serioze falis la valoro de la akcioj de kompanioj de petrolo, aŭto kaj kemiaĵoj. En decembro la prezindico de akcioj de Italio falis je 50%, tiu de Britio kaj Okcidenta Germanio je ĉirkaŭ 40% kaj tiu de Usono, Japanio kaj Francio je 25% kompare kun la pasinta kulmino.

Profitante la okazon internaciaj petrolmonopolaj kompanioj multege altigis la prezojn de petrolaj produktaĵoj, kio akute altigis la produktokoston de varoj kaj la transportan koston, pluapaaŭ levis la varprezojn kaj akrigis la inflacion. En la pasinta novembro la prezindico de konsumaj varoj en Usono pliiĝis je 8.4% kompare kun tiu de 1972, kaj la prezoj de konsumaj varoj de Japanio altiĝis je 14.8%. Leviĝis la prezoj de 1,200 specoj de varoj en variaj gradoj je 20-50%. La nombro de

varoj kun levita prezo plimultiĝis dekoble kompare kun tiu de 1972 kaj la skalo de prezleviĝo grandiĝis kvinoble. Ankaŭ la inflacio de la okcidenteŭropaj landoj senescepte pliiĝis. En la pasinta novembro, la prezo de konsumaj varoj en Britio altiĝis je 10.4% kompare kun tiu de 1972 kaj je 7.4% en Okcidenta Germanio.

Sub la influo de la energia krizo kaŭzita de manko de petrolo, Usono, Japanio kaj multaj el la okcidenteŭropaj landoj jam devis limigi la konsumadon de petrolo, elektro k.a. La vastaj popolamasoj havas tre malfacilajn vintrajn tagojn pro manko de petrolo kaj elektro por varmigo de sia loĝejo.


MALHELA PERSPEKTIVO DE 1974

La Okcidento ĝenerale opinias, ke 1973 estis jaro de skuado por la okcidenta ekonomio, kaj la perspektivo de 1974 fariĝos ankoraŭ pli malhela.

Ekonomikistoj kaj ĵurnaloj de Usono asertis, ke pro manko de energio la totala valoro de la produktado de Usono en 1974 reduktiĝos je 25-30 miliardoj da dolaroj, la inflacio kaj senlaboreco pli serioziĝos, la senlaboreca proporcio superos 6%, la produktokvanto de ŝtalo reduktiĝos je 7-12 milionoj da tunoj kaj multaj industrioj renkontos seriozan baton. Manko de kemia sterko kaj oleo uzata en agrikulturaj maŝinoj malbone influos la agrikulturan produktadon en granda skalo. La ekonomiaj rondoj de la okcidentaj kapitalismaj landoj asertis, ke en la kuranta jaro eble aperos nova ekonomia krizo en Usono.

La japanaj ekonomiaj rondoj konjektas, ke en 1974 la efektiva kresko de la japana ekonomio reduktiĝos je 5.2%, kaj la varprezoj leviĝos je almenaŭ 19.5%. La japanaj oficialuloj antaŭdiris, ke la produkta aktivado de Japanio reduktiĝos je 20-25%, la kvanto de multaj eksportaj industriaj produktaĵoj malpliiĝos, la skalo de la ekstera komerco malgrandiĝos, la internacia spezado malboniĝos kaj la rezerva kvanto de eksterlandaj monoj reduktiĝos.

Ankaŭ la okcidentaj landoj asertis, ke en 1974 la kresko de ilia ekonomio malleviĝos kaj la senlaboreco kaj inflacio serioziĝos. Iu oficisto de la Japana Financa Ministerio diris, ke granda depresio aperos en la kapitalisma mondo, se en Japanio, Usono kaj okcidenta Eŭropo samtempe okazos ekonomia krizo en la kuranta jaro.



RIĈA RIKOLTO DE VINTRA TRITIKO EN TIBETO

Antaŭ la Liberiĝo en Tibeto oni kulturis nur sekalon kaj tritikon en printempo, kaj la hektara produktokvanto estis nur 700-800 kg. En 1951, nelonge post la paca liberiĝo de Tibeto, la Kompartio sendis agronomojn al Lasao. En 1952 ili komencis unuafokan kulturadon de vintra tritiko en Tibeto. El ilia klopodado rezultis, ke ĉiu hektaro donis 4,320 kg. da greno. En 1964 Linĝi kaj iuj aliaj gubernioj komencis kulturi vintran tritikon. Depost la komenco de la kultura revolucio pli kaj pli multiĝis la kampoj de vintra tritiko. En 1973 Tibeto akiris abundan rikolton de vintra tritiko sur vasta areo kaj meznombra hektara produktokvanto superis 3 tunojn. Tio estas grava ŝanĝiĝo en agrikulturo de Tibeto. Nun oni jam plivastigis la kulturan areon de vintra tritiko ĝis 20,000 hektaroj kaj tritiko estas kulturata ankaŭ en lokoj je alteco de 4,050 metroj super la mara nivelo.

NOVAJ ATINGOJ EN FORSTUMO

En aŭtuno de 1973 la norda kamparo de nia lando vaste disvolvis forstumadon, semkolektadon kaj arbidkulturadon. Laŭ nekompleta statistiko de la provincoj Hejlongjiang, Liaŭning, Hebej, Ŝanhi, Gansu, la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kaj Pekino, en la pasinta aŭtuno oni forstumis 120,000 hektarojn kaj kolektis pli ol 6,000 tunojn da arbosemoj. Multaj komunumoj starigis arbidejon, preparis teron kaj faris fosaĵojn por la printempa forstumo.

DISVOLVIĜO DE LA CIVILA AVIADO DE ĈINIO

La civila aviado de Ĉinio ekfunkciis en 1950. Ĝi rimarkinde disvolviĝis en la pasintaj jaroj. Enlande, kun Pekino kiel la centro, la pli ol 80 naviglinioj interligas pli ol 70 urbojn. La longo de la linioj estas 6-oblo de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. La kvanto de la transportitaj pasaĝeroj kaj tiu de la varoj kreskis respektive 45-oble kaj 30-oble. Eksterlande, Ĉinio starigis interrilatojn kun pli ol 100 fremdlandaj aviadaj kompanioj.

Krom transportado de personoj kaj varoj, la civila aviado servas al preventado kaj ekstermado de malsanoj kaj fiinsektoj de plantoj kaj arboj, al faligo de arta pluvo, forigado de fiherboj, sterkado, semado, semado de arboj kaj al protekto de arbaroj kontraŭ incendio. Kaj krome, aviadiloj estas uzataj ankaŭ por prospektori mineralojn, desegni mapojn, difini linion de fervojoj, enketi pri arbaroj, fari projekton de riverordigo ktp.

EKFUNKCIO DE DEKOJ DA GRANDAJ KAJ MEZGRANDAJ HIDROELEKTRAJ STACIOJ

En la Granda Proleta Kultura Revolucio Ĉinio konstruis dekojn da grandaj kaj mezgrandaj hidroelektraj stacioj. Iuj el ili situas en krutaj valoj de la supra parto de la Flava Rivero, aliaj troviĝas sur ĉefaj branĉaj fluoj de Jangzi-rivero, triaj dise lokiĝas en la provincoj Liaŭning, Hunan, Gianghi, Fugian, Guangdong kaj la Guanghi-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono. Ĉiuj ili jam komencis liveri elektran energion. Ĝis septembro de 1973, la totala kapacito de la akvo-energiaj generatoroj de la tuta lando kreskis ĉirkaŭ duoble kompare kun tiu de 1965.

En la kamparo de la lando, oni konstruis pli ol 50,000 malgrandajn hidroelektrajn staciojn kaj ilia kapacito 7-oble grandiĝis kompare kun tiu de 1965.



La Ĉinaj Riveroj


Ĉina Geografio

SUR la vasta tero de Ĉinio estas multaj riveroj, el kiuj pli ol 1,500 havas sian basenon de pli ol 1,000 kvadrataj kilometroj. Kun la linio de suda parto de la Granda Hing-an-montaro, Jinŝan-montaro, orienta parto de Kilian-montaro ĝis Gang-gardesi-montaro kiel limo, ĝia sudoriento estas regiono de riveroj eksteren fluantaj kun ĉ. du trionoj de la areo de la tuta lando kaj ĝia nordokcidento estas regiono de riveroj internen fluantaj kun ĉ. triono de la areo de la tuta lando.

La tero de Ĉinio ĝenerale kliniĝas de nordokcidento al sudoriento, tial la eksteren fluantaj riveroj plejparte fluas en Pacifikon, kiaj, laŭvice de nordo al sudo, Hejlonggiang-, Liaŭhe- kaj Hajhe-riveroj, la Flava Rivero, Huajhe- kaj Jangzi-riveroj, Perlo-rivero k. a. Malmultaj el ili kiaj Nugiang- kaj Jalucangpo-riveroj fluas tra fremdaj landoj en la Hindan Oceanon. Kaj Irtis-rivero de Hingiang fluas norden en Arktan Oceanon.

Oni taksis, ke la totala flukvanto de la ĉefaj riveroj de Ĉinio estas pli ol 2,700 miliardoj da kubmetroj kun akva energio de 580,000,000 kilovatoj. La eksteren fluantaj riveroj kun abunda pluvkvanto kaj tra montoj enhavas abundan akvoenergion. Aparte giganta estas akvoenergio en la regiono de Hengduan-montaro pro la kruta deklivo. Ankaŭ la mallongaj riveroj de Ĝegiang, Fugian kaj Tajvan kun kruta deklivo kaj rapida fluo enhavas sufiĉe abundan akvoenergion. Kun preskaŭ ĉiam abunda akvo, malmulta sablo pro densaj vegetaloj en la baseno kaj sen glaciĝa periodo, la riveroj de la suda Ĉinio favoras al irigaciado, navigado kaj elektroproduktado. La riveroj en norda Ĉinio malfavoras al navigado pro granda ŝanĝiĝo de akvokvanto en diferencaj sezonoj kaj longa aŭ mallonga glaciĝa periodo, kaj iliaj litoj en malsupraj basenoj estis ofte ŝtopitaj pro grandkvanta sedimentado de sablo kaj iuj eĉ fariĝis pli alta ol la surfaco de tero, tiel ke ili povas facile ŝanĝi sian vojon kaj kaŭzi inundon.

La nova fera pontego sur la Flava Rivero



La internen fluantaj riveroj de Ĉinio troviĝas en internkontinentaj basenoj kaj altebenaĵoj malabundaj je pluvakvo, el kiuj la ĉefaj, kiaj Tarim-, Cajdam-kaj Ŝule-riveroj, troviĝas en seka regiono de nia nordokcidento. La akvofonto de tiuj riveroj devenas de glacio kaj neĝo sur altaj montoj kaj iliaj akvokvanto kaj longeco estas influitaj de la kvanto de degelintaj glacio kaj neĝo, tiel ke la fluoj ofte interrompiĝas kaj formis sezonajn riverojn.

Krom la naturaj riveroj, la ĉinaj laborantaj popolanoj fosis multajn kanalojn, ekzemple, la Granda Kanalo de Pekino ĝis Hangĝoŭ elfosita en la antikveco (kun longeco de 1,700 km.), reto da kanaletoj sur la Delto de Jangzi-rivero, kaj la kanalo Ruĝa Flago kaj kanaloj de Hajhe-akvosistemo kondukigantaj al maro, konstruitaj post la Liberiĝo.

LA ĈEFAJ RIVEROJ

Jangzi-rivero kun longeco de 5,800 km. estas la unua granda rivero de Ĉinio, kiu fontas el Kokohili-monto okcidente de Kinghaj-provinco kaj fluas tra ok provincoj, aŭtonoma regiono kaj municipo. La areo de ĝia baseno estas 1,800,000 kvadrataj kilometroj, t.e. kvinono de la totala areo de Ĉinio, sur kiu estas 250 milionoj da loĝantoj.


Kun abunda akvoenergio kaj disvolviĝa irigaciado kaj navigado, la baseno servas kiel ĉefa produkto de greno kaj kotonon kaj industria bazo de Ĉinio.

La Flava Rivero je 4,845 kilometroj longa estas la dua granda rivero de Ĉinio, kiu fontas el Juegugonglie-rivero ĉe la norda piedo de Bajan-karamontaro de Kinghaj-provinco kaj fluas tra ok provincoj kaj aŭtonoma regiono en Bohaj-maron. Ĝiaj ĉefaj branĉoj estas la riveroj Vejhe, Ginhe, Luohe kaj Fenhe. Frue antaŭ pli ol 5,000 jaroj, la praavoj de la ĉina nacio jam disvolvis agrikulturon kaj kreis brilan kulturon en ĝia baseno.

Hejlong-rivero: Kun suda kaj norda fontoj, ĝi nomiĝas Hejlong post kuniĝo de la du fluoj ĉe Luogucun okcidente de Mohe. Ĝia meza parto estas limrivero inter Ĉinio kaj Sovetunio kaj ĝi fluas tra Sovetunio fine en Oĥocka-maron. La rivero de Luogucun ĝis la maro longas je 2,850 kilometroj.

Perlo-rivero, la plej granda rivero en suda Ĉinio, konsistas el la Okcidenta, Norda kaj Orienta Riveroj. Ĝia trunka rivero la Okcidenta Rivero je pli ol 2,100 kilometroj longa fontas el Vumongmontaro de Junnan-provinco kaj havas akvokvanton je 8-oblo pli multan ol tiu de la Flava Rivero. Kun dense interkruciĝantaj riveretoj, la baseno de Perlo-rivero favoras al irigaciado kaj estas unu el la relative progresintaj ekonomiaj regionoj de Ĉinio.

Transportaj ŝiparoj sur Huajhe-rivero




Hajhe-rivero fontas el la montregiono inter Hebej- kaj Ŝanhi-provincoj. Ĝia supra parto konsistas el kvin riveroj. Tiuj riveroj kuniĝas ĉe Tiangin en riveron nomatan Hajhe-rivero. La areo de la baseno de la rivero konsistas el plejparto de Hebej-provinco, partoj de la provincoj Ŝanhi kaj Henan, kaj la urboj Pekino kaj Tiangin. La trunko de Hajhe servas kiel grava vojo por Tiangin al maro.

Huajhe-rivero: Ĝia trunko je 1,000 kilometroj longa fontas el Tongbo-montaro de Henan-provinco kaj fluas tra Henan, Anhuj kaj Giangsu. Cent milionoj da loĝantoj vivas sur ĝia baseno kun pli ol 13,300,000 hektaroj da agroj kaj abundaj riĉfontoj sub la tero.

JUNGADO DE RIVEROJ

La malnova Ĉinio estis lando turmentata de frekventa superakvego. Pro ignorado kaj eĉ subfosado de antaŭaj reakciaj regantoj al akvoutiliga konstruado, multaj riveroj fariĝis malutilaj al sia baseno, el kiuj la plej seriozaj estas la Flava Rivero, Huajhe-rivero kaj Hajhe-rivero.

La nova Ĉinio post sia fondiĝo verkis novan historion pri la akvoutiliga konstruado de Ĉinio. Komence de la jaro 1950, Prezidanto Maŭ Zedong faris sinsekve grandajn alvokojn: “Nepre jungu Huajhe-riveron”, “Por la interesoj de la vasta popolo, batalu por gajni venkon super la Ginggiang-a Akvodivida Konstruaĵo”, “Bone aranĝu la Flavan Riveron” kaj “Nepre jungu radikale Hajhe-riveron”, kaj la ĉina popolo disvolvis gigantan batalon por jungi riverojn. En mont- kaj montet-regionoj de la supra baseno de diversaj riveroj konstruiĝis pli ol mil grandaj kaj mezgrandaj akvorezervejoj kaj dekmi- loj da malgrandaj akvorezervejoj; krome oni faris multajn laborojn por konservi akvon kaj teron en la regionoj kun serioza erozio, konstruis kaj riparigis digojn je pli ol 100,000 kilometroj longajn en meza



Jangzi-rivero

kaj malsupra partoj de la grandaj riveroj kaj fosis ĉirkaŭ cent drenajn kanalojn en ebenaĵoj kaj apudmaraj regionoj suferantaj de serioza akvego. Rimarkindaj efikoj ankaŭ vidiĝis en la jungado de Jangzi-rivero, la Flava Rivero, Huajhe- kaj Hajhe-riveroj.

La riĉa akvoenergio de Ĉinio estas senĉese ekspluatata kaj utiligata de multaj novaj hidroelek- trejoj kaj pumpstacioj konstruitaj lastjare. Multaj grandaj irigaciaj kaj drenaj kanaloj ĉiam donas pli multan utilon al nia lando.

Sur la kovrilo:

Antaŭenmarŝi sub la ĝusta gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la direkto de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ (Sceno el la revolucia moderna pekina opero *Rhododendra Monto*)

Sur la dorskovrilo:

Mirindaĵo de Huangŝan-monto



EL POPOLA ĈINIO 中國新道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 3 (188) 1974

Ĉefa Enhavo

Riĉa rikolto de agrikulturo de nia lando	1
Vigle disvolviĝanta petrola industrio de Ĉinio	5
Utiligi malutilaĵojn por la popolo	8
Vastaj arbaroj sur sabloamasoj	13
Kien la rubo?	16
Postlabora vivo de laboristoj de iu fabriko	19
Pri la laborasekuro kaj bonstatigaj aferoj	21
Ekspozicio de agrikulturo kaj forstumo en Pekino	22
Rhododendra monto	25
Korbo da karpoj	29
Ĉio por la kolektivo	30
Senripoza emerito	34
Ili fariĝis mastroj de brokarto	36
Sinjoro Masuda Vataru — amiko de Lusin	39
Ekonomio de la kapitalisma mondo en malfacila situacio	41
La ĉinaj riveroj	45



Strato de Kaŝgar. Antaŭ la Liberiĝo sen vento ĉi tie estis polva nebulo, kaj en pluvo ĉie kotaĵo.

Nova Fizionomio de Kaŝgar

Tute noviĝis Kaŝgar, la plej okcidenta antikva urbo de nia lando en la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.

Antaŭ la Liberiĝo, pro la longa krima regado de kuomintangaj reakciuloj la urbo aspektis tre kaduka. La stratoj estis mallarĝaj kaj la nacimalplimulto vivis tre mizere.

Post la Liberiĝo, dank' al la kora zorgado de Prezidanto Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio de Ĉinio kaj la helpo de la tuta popolo, la popolo de Kaŝgar disvolvis la produkton kaj rekonstruis la urbon. Nun apud la larĝaj stratoj aperis novaj konstruaĵoj kun nacia stilo. Elektra, tekstila kaj aliaj malpezaj industrioj kreskis tie el nulo. Ankaŭ la metiartoj de diversaj naciecoj kun longa tradicio akiris rapidan disvolviĝon dank' al la subteno de la registaro. Rimarkinde pliboniĝis la vivo de diversnaciecaj popolanoj.




Ujguraj laboristinoj de la Ŝpinteksejo en laboro



Kotona Ŝpinteksejo de Kaŝgar finis ĝian historion sen produkto de ŝtofoj.




Maljuna popola artisto provas nove produktitajn naciajn muzikilojn.



Maljuna laboristo produktas manlavajn Aputu-kruĉojn.



Uguraj laboristinoj teksas tapiŝojn.





Instruisto kaj lernantoj de la Unua Mezlernejo de Kaŝgar kune faras kemian provadon.

En amuzado





Paŝtado de cervoj

(Ebura skulptaĵo)

